

1974 aprilo
67-a jaro
n-ro 820 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Post Hamburgo: al Kronach!

Vi trovos

ke la ĉefan lokon en ĉi tiu numero okupas plurpaĝa artikolo de la prezidanto de UEA, en kiu li admonas la membraron pri la danĝeroj, kiujn li vidas en la nuntempa Esperanto-movado, kaj starigas la alternativon, ĉu “liberigi la Asocion de tiuj evidentaj negativajoj” aŭ ĉu li “foriros de ĉio”.

Konsiderindan spacon okupas ankaŭ artikolo de la prezidanto de la Hamburga LKK kaj interesaj novaĵoj, kiuj venas el Usono. Post plurmonata foresto, vi denove trovos la kutiman rubrikon de CED; enestas tri ampleksaj recenzoj, listo de la plej novaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo, TEJO-paĝo kaj aliaj rubrikoj. Per la ĉi-foja amplekso de la populara rubriko Loke—Fake—Persone ni klopodis kompensi la varieco-mankojn, kiuj sentiĝas en la unua duono de ĉi tiu numero.

Enhavo

- 61 Admono al la membraro: UEA en danĝero de malintegriĝo (I. Lapenna)
- 65 Premio por medicinistoj
- 66 La 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo: Post kvar monatoj (W. Bormann)
- 68 La mondfiro “Ekspo ‘74” en la usona urbo Spokane: La medio de morgaŭ (E.C. Pollock)
- 69 Grava evento en Usono
- 70 Informoj de CED
- 71 Kongresa komunikado: Novaĵoj pri la 59a UK en Hamburgo
- 72 Recenzoj (“Esperanto en lingvolaboratorio”, “Ni kaj Ĝi”, “Vojo kaj Vorto”)
- 74 Laste aperis ... (la plej novaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo)
- 75 TEJO-paĝo: Studenta interlingvistika seminario en Varsovio, La 30a Internacia Junulara Konferenco
- 76 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 78 Oficiala informilo, Nekrologoj (P. Bouvier, F. Parker, S. Stuit, H. Witkowski)
- 79 Esperanto en radio
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

La fortikaĵo “Feste Rosenberg”, juvelo de la mezepoka konstruado, dominas la pejzaĝon de la ĉi-jara Oficiala Postkongreso en Kronach, en Bavarujo, vojmeze inter Berlino kaj Munkeno. Fakte, la Postkongreson ĉi-jare aranĝas la urba turisma oficejo kune kun la lokaj aktivuloj de la Movado, kio promesas apartan profesion prizorgon de tiuj, kiuj decidiĝos ripozcele ĝui la belecojn de Kronach kaj ĝia verda, historika ĉirkaŭaĵo. Ni jam delonge planis al Kronach dediĉi spacon en la revuo, sed ni ĝis nun ne sukcesis tion efektiviĝi. Ĉu povus esti konsolo, se ni promesas certe reveni al la postkongresa urbo kaj ĝiaj belaĵoj en la maja numero de la revuo?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woëssink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

UEA en danĝero de malintegriĝo

IVO LAPENNA

LA FORMALA UNUIĜO de la neŭtrala Esperanto-movado, esprimita en la aktoj de 1947-48, kvankam sendube pozitiva fakto, neniel per si mem signifis aŭtomatan solvon de multnombraj problemoj, kiujn kaŭzis la postmilitaj kondiĉoj ĝenerale, kaj la tiama tre malforta interna situacio de UEA speciale. Dum ĉiuj kontentis kaj multaj jubilis pro la ĉesigo de la dueco, klarvidaj personoj bone komprenis jam tiam, ke necesos multflankaj sciencaj studoj, abundaj spertoj akireblaj nur per intensa praktika laboro, kaj grade vastiĝantaj diversdirektaj agadoj — ĉio ĉi kombinita en unu granda tuto — por fortikigi la Asocion interne surbaze de unueca platformo; por transformi iom post iom la Esperanto-movadon en atentindan kulturan kaj socian faktoron de la nuntempo; por doni al la Internacia Lingvo la merititan prestiĝon kaj tiel faciligi ĝian pluan disvastiĝon.

Bazaj konceptoj

Konkrete, sukcesa laboro postulis, unuavice, teorian pritrakton kaj praktikan aplikon de kelkaj esence gravaj bazaj konceptoj: universaleco kaj neŭtraleco, unueco en diverseco, kunligiteco kaj interdependeco, celoj kaj rimedoj. Ĉiuj el la menciitaj principoj, detale pritraktitaj en la baldaŭ aperonta monumenta verko *Esperanto en Perspektivo*, estas per si mem sintezo de kontrastoj, kontraŭaĵoj, aŭ eĉ antagonismaj tendencoj: humanisma internaciismo kiel idea fono, nedisigeble ligita al la Internacia Lingvo, troviĝas meze inter fermita naciismo kaj la unueca mondo de la estonteco; aktiva neŭtraleco, konforma al universaleco de la

lingvo kaj respondanta al humanisma internaciismo, solvas la antagonisman konflikton inter pasiva, indiferenta neŭtralismo kaj ekstrema partipolitikismo; unuecon limigas diverseco ekzistanta en la realo, kaj diversecon mildigas la postulato de unueco (v. ankaŭ la artikolon pri unueco en la januara *Esperanto*, 1974); kunligiteco de ĉiuj agadoj — unuavice en la tri ĉefaj branĉoj: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj — estas kondiĉita de ilia interdependeco; demokrateco kun memdisciplino okupas centran pozicion de pozitivo kontraŭ ambaŭ inter si konfliktantaj ekstremoj de diktaturo kaj anarkio (v. ankaŭ la koncernan artikolon en la decembra *Esperanto*, 1973); fine, celo sen rimedoj estas absurdaĵo, kaj neutiligo de rimedoj por atingi la celon estas stultaĵo.

Prenitaj pare, ĉiu el la duopoj prezentiĝas kiel tuto, en kiu la kontraŭstarantaj flankoj kompletigas kaj samtempe limigas unu la alian, kaj per sia kontrasta kunekzisto formas unuecan bazan koncepton. Ĉiuj bazaj konceptoj kune, en ekvilibra sintezo de kompleksaj interagoj, fariĝis la firma fundamento, sur kiu estis eble solvadi organizajn demandojn konforme al la bezonoj de unuopaj evoluperiodoj; realigi paralelajn agadojn en la sferoj de informado, instruado kaj praktikaj aplikoj, post *realecaj* taksoj de faktaj eblecoj; samtempe klopodi finance fortikigi la Asocion.

Grandiozaj estis la taskoj, kiujn en 1948 kaj poste frontis UEA kaj ĝiaj organoj aŭ unuopaj funkciuloj, al kiuj la membraro konfidis la gvidadon de la Asocio. Ĉu ili estas plenumitaj?

Nekontestebaj atingoj

Post la supraj iom abstraktaj tezoj – kvintesenco, tamen, de multjaraj observoj, studoj kaj spertoj – ni transiru al konkretaj faktoj en malpli abstrakta lingvaĵo. Venkante multajn malfacilaĵojn – de eksteraj persekutoj ĝis internaj miopecoj – la neŭtrala Esperanto-movado, konscie kaj celtrafe gvidata de UEA laŭ du bazaj perspektivaj programoj kaj pluraj okazaj laborplanoj, faris rimarkindajn progresojn en ĉiuj direktoj. Tio ne falis el la nuboj. Ĉiu el la multaj grandaj eksteraj kampanjoj, ĉiu interna fortikiga agado, ĉiu reorganizo por adapti la strukturon al la aktualaj bezonoj, ĉiu el la klopodoj havigi la minimume necesajn financajn rimedojn postulis amason da tempo kaj scioj por antaŭpreparoj, planado, kunordigado kaj realigado. Sole la subskribinto oferis milojn da efektivaj laborhoroj ekde 1948 tiucele, ne kalkulante la antaŭan laboron en Jugoslavio. Aliajn centmilojn da laborhoroj, same senkompanse, donis centoj, en iuj sferoj eĉ miloj da talentaj kaj sindonaj, pozitivaj fortoj laborante sur internacia, landa, loka aŭ faka niveloj. La motivo certe estis nek materia gajno (neimagebla, cetere), nek kontentigo de iuj personaj ambicioj, sed sole la konvinko pri la praveco de nia starpunkto kaj la ĝusteco de la principoj, laŭ kiuj ni ekagis por venkigi ĝin. Unu sukceso post la alia efikis inspire kaj mobilize, kio siavice kuraĝigis vastigon kaj profundigon de la agadoj.

Se oni eĉ nur supraĵe trafolumas la Estrarajn Raportojn ekde 1948, oni facile konstatas la daŭran progresadon en ĉiuj direktoj, reciproke kunligitaj: interna fortikigo, kvalita plibonigo kaj kvanta kreskigo de nia informado, sciencaj esploroj kaj dokumentado, novaj elstaraj periodaĵoj, instruado en diversaj formoj, evoluigo de niaj kongresoj elde iaspecaj provincaj foiroj al monde respektataj kulturaj-laboraj aranĝoj, multflankaj kontribuoj al kultura riĉigo de la lingvo (ISU, Oriento-Okcidento, belartaj kaj oratoraj konkursoj, teatraj prezentadoj, artaj festivaloj) ktp. ĝis la prestiĝaj eksteraj rilatoj kun Unesko, UN kaj amaso da aliaj organizaĵoj. Tuta numero de *Esperanto* necesus nur por listigi sen komentoj ĉiujn atingojn. Sufiĉas, eble, memori, ke en 1948 UEA konsistis el 26 aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj, havis 17 007 membrojn en 70 landoj kaj 2 224 delegitojn en 58 landoj; en 1972 ĝi konsistis el 54 aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj, havis 32 632 membrojn en 88 landoj, kaj 3 556 delegitojn en 65 landoj. La kapitalo, kiu en 1948 estis ronde ĉ. 50 000 gld. konstante kreskis kaj estis preskaŭ dekoble pli granda en 1972, se oni prenas en konsideron la faktan valoron de la domo en Rotterdam. Aldone, dank'al iniciato kaj laboro de Marianne Vermaas, la Institucio Hodler 68 kolektis en formo de donacoj kaj pruntoj pliajn 150 000 guldenojn, taŭge investitajn. Ankaŭ la domo de UEA en Rotterdam, la bone ekipita CO kaj la fortikiĝinta financa bazo, kreu al mi, ne falis el la nuboj!

Mallonge, ni sukcesis konduki la Asocion kaj sekve la tutan neŭtralan Esperanto-movadon el senperspektiva rutino, kelkrilate sur la rando de abismo, al dinamisma, forta organizaĵo kun alte respektata reputacio en la ekstera mondo.

“Kiel faligi Lapenna?”

Jam antaŭ pluraj jaroj mi atentigis pri la subfosa agado de grupeto da personoj, kiuj pro diversaj obskuraj motivoj klopodas detrui la atingojn kaj grave kompromiti ĉiujn objektivajn valorojn en la Esperanto-movado. Post la UK en Londono (1971) tiu maldigna kampanjo intensiĝis, kaj oni povas atendi kun grandega verŝajno, ke ĝi atingos eĉ pli vastajn dimensiojn en la sekvaj semajnoj, antaŭ la UK en Hamburgo. La metodo estis kaj restas: artikoloj kun insultaj atakoj, malveroj kaj duonveroj (eĉ pli danĝeraj ol la malveroj) en 2-3 gazetoj; rifuzo de la ĉiopovaj redaktoroj publikigi korektojn kaj kontraŭajn opiniojn kun la celo teni la legantaron plene sub sia influo (interalie: pro la rifuzo de la redaktoro de *British Esperantist* publikigi mian korekton, mi ekŝiĝis el Honora Membreco de BEA, sed la kaŭzojn oni ĝis nun prisilentis al la brita esperantistaro); intenca prisilentado de ĉiuj novaj atingoj, precipe se ligitaj al mia nomo; sekretaj kalumniaj cirkuleroj; sekretaj korespondaĵoj de la koncernaj personoj direktitaj eĉ al unuopaj membroj de la Estraro de UEA; sekretaj kunvenoj, ekzemple unu fine de decembro en FR Germanujo kun la ĉefa punkto de la tagordo “Kiel faligi Lapenna?”.

Fine, evidente kun la celo naŭzigi min komplete eĉ pri la vorto “Esperanto”, grupeto aŭ individuo sendas ne nur al mi, sed ankaŭ al aliaj personoj insultajn anonimajn telegramojn el Parizo ĉiam kun la subskribo “Pariza Esperantista Tribunalo” aŭ “Pariza Tribunalo”. Ekde julio 1971 entute estis senditaj ĉ. 40 tiaj longaj telegramoj. Esploroj ĉe la francaj aŭtoritatoj montris, ke la koncerna individuo aŭ grupeto indikas kiel sendinton aŭ min mem, aŭ iun el miaj bonaj amikoj, ekzemple Harry Holmes, Jean Thierry k.a. Tio, kompreneble, jam estas ekster la sfero de ordinaraĵoj kaj troviĝas profunde en tiu de krimo ne nur pro la insulta kaj kalumnia enhavo, sed ankaŭ pro la kontraŭleĝa misuzo de nomoj.

Mi ne eniros en kiun ajn detalon, ĉar mi timas, ke eĉ la nura tuŝo necese malpurigos miajn manojn. Krome, tio povus nur kaŭzi plian malbonon al afero, je kies grandeco mi plu fidus, ĉar certe ne kulpas Esperanto, se ĝin ellernis eĉ tiaspecaj individuoj. Sufiĉas diri, ke elstara membro de la Asocio, bonega konanto de la historio de Esperanto, diris al mi: “Estis multaj fiaĵoj en la historio de la Esperanto-movado, sed la nunaj superas ĉiujn kune”.

Tia, do, estas la respondo al la demando “kiel faligi Lapenna”: ne per sincera kaj honesta diskuto aŭ konstrua kritiko, kiu evidentigus miajn eventualajn erarojn en gvidado de UEA kaj ĝenerale en la laboro por la Internacia Lingvo, sed per obskuraj komplotoj,

unuflanke, kaj per krimaj agoj kun la celo kalumnii kaj nigrigi, aliflanke.

Atenco kontraŭ neŭtralecon: “kadavro”

Laŭ pluraj fidindaj informoj — eĉ de du personoj aktive partoprenintaj en tiu subfosa agado, sed ĝustatempe malfermintaj siajn okulojn — estas klare, ke la celo de la tuta kampanjo estas plene ekregi la Asocion kaj utiligi ĝin por siaj politikaj celoj (en la kazo de unu grupeto) aŭ por kontentigi siajn personajn troblovitajn ambiciojn (alia grupeto). Kiam mi demandis unu el ili, kion fakte oni kritikas rilate mian gvidadon de UEA, li respondis proksimume: “Fakte nenion, sed oni rigardas vin bastiono de neŭtraleco; tial detrui vian popularecon per nigrigoj faligos vin kaj la neŭtralecon”. Eble en ligo kun tiu celo, aŭ ekster kia ajn ligo, R. Cash, estinta oficisto en la CO de UEA, skribis en artikolo publikigita en *Kontakto* n-ro 3/73, ke en TEJO oni ne plu malŝparas sian tempon pri “mucida neŭtraleco”, kiu temo estas “morta mefito” kaj “forgesita miozoto”, kaj ke nur en kelkaj “maturaĝaj” rondoj “oni ankoraŭ priflaras kaj palpetas la kadavron” (p. 18). Mi ne donos ekzemplojn de kruda malobservado de neŭtraleco en la lastaj 2-3 jaroj, kiu jam sufiĉe kompromitis la Asocion kaj perdigis al ĝi valorajn membrojn. Ĉiam la samaj personoj misuzis la prestiĝan pozicion de UEA ekspluatante ĝian neŭtralecon. Kial ekspluatante? Ĉar, se UEA havus difinitan politikan koloron, tiam ĝia apogo estus praktike senvalora; sed se ĝi havas reputacion de serioza politike neŭtrala monda organizaĵo, tiam la apogo de tiuj, kiuj arogas al si la rajton paroli en ĝia nomo aŭ en tiu de ĝia junulara sekcio, ja havas pezon! Kaj precize tio eksplikas la nunan klopodon plene ekregi en UEA kaj misuzi ĝian internacian reputacion, eble eĉ ĝian kapitalan rezervon, por nete politikaj celoj.

La kalkuloj de la atencantoj, tamen, ne estas tute ĝustaj. Se ili sukcesos — kaj ili ja povas sukcesi, se la tuta membraro ne konsciigos en tiu ĉi lasta momento — tre baldaŭ UEA eniros en la liston de politikaj organizaĵoj de difinita tipo, kaj sekve perdos la valoron eĉ por tiuj, en kies servon oni intencas ĝin meti. Krome, tutcerte multaj landaj asocioj eksigos, la individua membraro abunde forlasos la Asocion, okazos plena malintegriĝo kaj kolapso. La pene konstruita moderna, forta kaj prestiĝa UEA ĉesos ekzisti. Estinta membro de TEJO, ege progresema el ĉiuj vidpunktoj, skribis al mi antaŭ nelonge: “La venko de viaj oponentoj en Hamburgo povas nur aŭguri la baldaŭan pereon de UEA”. Oni ne forgesu, ke por konstrui solidan domon necesas multe da scio kaj laboro; por detrui ĝin per modernaj eksplodigiloj sufiĉas nur sekundoj!

Detruado de aliaj valoroj

La slogano “estu paco”, tiel ŝatata en la Esperanto-movado ekde ĝiaj komenciĝoj, estas principe bona, salutinda kaj observenda. Tamen, se oni interpretas ĝin kiel ian “devon” ne reagi kontraŭ plej seriozan minacon, ĝi fakte helpas la minacon. Ne povas esti

“paco” inter vero kaj mensogo, inter agreso kaj defendo, inter bono kaj malbono. Eĉ Kristo, kiun verŝajne neniu, senkonsidere al sia religia aparteno, povas kalumnii pro “instigado al malpaco”, elvapis la komercistojn el la templo. En la aktuala kazo la pasiveco, eĉ timiga pasiveco, kuraĝigis aliajn atakojn je ĉiuj objektivaj valoroj en la nuntempa Esperanto-movado. Eĉ la Akademio de Esperanto, kiu neniam laboris tiel science kaj efike, kiel nun sub la prezidanteco de prof. Waringhien kaj liaj kolegoj en la Estraro, suferis plurajn atakojn, el kiuj elstaras tiuj en la rubriko “Aliflanke” de *British Esperantist* de novembro-decembro 1973 kaj januaro-februaro 1974. En la artikolo de s-ro E.L.M. Wensing, publikigita en la sama januara-februara *BE*, troviĝas ne plu nur atakoj kontraŭ tuta aro da objektivaj valoroj, sed ankaŭ nekredeble senbaza kaj maljusta juĝo pri Esperanto mem kun samtempa tute nescienca laŭdegado de la angla. Esperanto por la aŭtoro ne estas vivanta lingvo, sed nur “projekto”, eĉ “projekto” posedanta sole “pli riĉan literaturon ol iu ajn antaŭa projekto” (!), kaj ne multoble pli grandan ol ĉiuj ĉ. 800 projektoj kune. Ne distingante inter science bazita pritrakto kaj amatoreco, li riproĉas ian kvazaŭan ĝeneralan “amatorecon” kaj “diletantecon” de ĉio en la Esperanto-movado, sed ne vidas, ke EKI, kies prezidanto kaj verŝajne sola estrarano li nun estas, ekde la fondiĝo de EKI en 1963 atingis fakte nenion en medioj de komerco kaj industrio: nek amatore, nek fake, se oni esceptas la nunan publikigon de la *Internacia komerca-ekonomika vortaro*, elstara verko de s-ro F. Munniksma. Verŝajne nek li, nek la redaktoro rimarkis, ke pli grandan esprimiĝon de amatoreco kaj diletantismo ol estas la koncerna numero de *BE* oni apenaŭ povas imagi kun la escepto de la indiko “Eŭropa Eldono” kaj la mapo de okcidenta Eŭropo, ĝi havas absolute nenion eŭropan. Fine, por kompletigi la bildon, la aŭtoro de “Aliflanke” en *BE* aoncis tute klare per sia bondezira novjara karto: “Jen 1974 — Ni tuŝu la Fundamenton!”. Do, la sekva viktimo estos la Fundamento mem, tiu sendiskute baza lingva kerno, al kiu ŝuldiĝas la nuna vivanteco kaj unueco de la lingvo.

Se oni legus tiajn absurdajn atakojn en iu nete malamika nacilingva periodaĵo, oni tion povus kompreni kaj tutcerte ankaŭ sukcese rebati. Publikigi tiaĵojn en oficiala organo de landa asocio signifas nekredeble malprudentan segadon de la branĉo, sur kiu ni sidas. H.A. de Hoog skribis en *Dia Regno* de februaro 1974 rilate alian negativan fenomenon, ke tio “montras la mizeran konsiston etikan kaj gramatikan de tiu fronto, kiu, eĉ sen prestiĝo kaj validaj argumentoj, povas tamen plu krei konfuzon inter la nove bakitaj esperantistoj kaj skeptikecon inter la ĝenerala publiko kaj ĉe la respondecaj instancoj oficialaj de la diversaj landoj”. Tiuj vortoj aplikiĝas al ĉiuj nuntempaj defetismaj negativaĵoj. Kaj ĝuste tio estas unu el la ĉefaj obstakloj al plua progresado. Se oni ne haltigas plej energie tiun subfosan agadon, ne nur la plua progresado, sed eĉ la ekzisto mem de Esperanto mem kiel lingvo estos en danĝero.

Aktiva neŭtraleco

Ĉar, kontraŭ mia volo, mi fariĝis “faligota bastiono de neŭtraleco”, eĉ iusence simbolo de la konceptaro pri la senco mem de nia lingvo en la nuntempa socio kaj pri la moderna UEA, mi ankoraŭfoje precizigu mian firman starpunkton:

Senkompromise mi defendas la principon de pozitiva aŭ aktiva neŭtraleco ne tial, ĉar mi persone estus neŭtrala rilate sociajn kaj politikajn problemojn (neniu estas neŭtrala tiurilate), sed tial, **ĉar la neŭtraleco de UEA estas absoluta kondiĉo de ĝia universaleco, kiu, siavice, respondas al la universaleco de la lingvo.** Diference de la senvertebra neŭtralismo, tiel ofte praktikata antaŭ 1947, la aktiva neŭtraleco signifas, ke (i) UEA ja estas kaj devas esti neŭtrala rilate partipolitikon, sed ĝi ne estas neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton, inkluzive la politikan, de la lingva problemoj; (ii) ĝian neŭtralecon nun difinas la respekto de la homaj rajtoj laŭ Art. 4 de la Statuto; (iii) la neŭtraleco finiĝas tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ la lingvon; la persekutoj de la personoj, kiuj ĝin scias; la oficiala malebligo de kia ajn organizita laboro por Esperanto. Tian koncepton mi formulis jam en Jugoslavio, longe antaŭ la milito, kaj laŭ ĝi mi konsekvence agis dum mia tuta laboro por Esperanto.

Anticipe mi pardonpetas pro la uzota “mi” en la sekvaj linioj, sed en tiu ĉi kunteksto ĝi estas neevitebla. Estis mi kaj miaj tiamaj junaj geamikoj, kiuj energie aŭdigis nian voĉon kontraŭ hitlerismon, dum la tuta cetera neŭtralisma Esperanto-movado tombe silentis, aŭ eĉ provis “flati” al la nazioj — interalie per la hontinda elpelo de judaj esperantistoj el niaj societoj en Germanujo kaj per kreo de naziaj Esperanto-organizaĵoj — por “savi la aferon”, kiun, kompreneble, ili ne “savis”, sed humilige kompromitis. Estis mi la sola, kiu dum la UK en Londono (1938) plej forte protestis en la sama senco. Estis mi denove, kiu dum la UK en Bern (1947), apogita de deko da landaj asocioj, proponis Rezolucion kondamnantan la krimojn de la nazioj, kies viktimoj estis ankaŭ tre multaj esperantistoj, inkluzive la familion Zamenhof. Post la malkuraĝa malakcepto de la Rezolucio per ĉ. 2/3 de la Berna Kongreso, ankoraŭfoje dank’al mia insistado la parto pri la homaj rajtoj eniris en la Statuton de UEA kaj fekundigis la neŭtralecon per humaneca enhavo, ktp. Pro tiu principa starpunkto mi devis suferi multajn personajn ĝenojn kaj persekutojn, unue en la duonfaŝisma antaŭmilita Jugoslavio; poste, ekde 1947, fare de ekstreme dekstraj elementoj en Usono (helpataj de similaj individuoj en kelkaj aliaj landoj), kiuj lanĉis mondiskalan kampanjon de kalumnioj ĉefe pro la Berna Rezolucio, kaj ne hezitis eĉ denunci min al aŭtoritatoj de multaj ŝtatoj. Tiu ekstreme dekstra atako kontraŭ la neŭtralecon de UEA kaj min persone kiel ĝian “bastionon” ĉesis nur en 1956, kiam UEA fine eksigis el siaj vicoj s-ron G.A. Connor, la ĉefon de la tiama intrigo.

Aliflanke, necesis plurfoje interveni kaj interne de la Movado kaj ekstere pro malobservoj de neŭtraleco fare de la alia ekstremo. Tial la atakoj kontraŭ la principon de neŭtraleco nun venas de tiu alia flanko. Ĝin formas kelkaj, kiuj plene konscias pri sia celo, sed ankaŭ kelkaj, kiuj en sia politika nematureco fakte eĉ ne scias, al kiu “maldekstra” fluo aŭ nuanco ili apartenas, sed por kiuj ĉefas detruo por elviviĝi en detruado kaj por “fariĝi gravaj” per detruado. Kaj plian fojon mi mem — pli precize: mia dorso — fariĝis la ĉefa pafcelo.

Espereble, la situacio rilate neŭtralecon estas nun tute klara. Espereble, eĉ la membroj de UEA apartenantaj al diversaj politikaj partioj aŭ kun fortaj partipolitikaj ligoj komprenas, ke detruo de la neŭtraleco de UEA signifas la finon de UEA mem kiel monda internacia organizaĵo. Se ni ĉiuj povis dum multaj jaroj, eĉ en la periodo de la t.n. “malvarma milito”, amike kunsidadi ĉirkaŭ la sama tablo, kaj trovadi taŭgajn solvojn por progresigi Esperanton, kial ni ne povus fari la samon nun, kiam la eksteraj kondiĉoj estas pli favoraj kaj nia UEA multe pli forta? Se tamen iuj nepre volas politikumi per Esperanto aŭ uzi la lingvon por politikaj celoj, kial ne krei apartajn politikajn Esperanto-organizaĵojn, kun kiuj UEA povus eĉ eniri en kontraktajn rilatojn? Neniu povas havi ion ajn kontraŭ tio. Male, ĝi eĉ estus utila. **Sed oni ne tuŝu la politikan neŭtralecon de UEA, ĉar progresigi Esperanton ĉie en la mondo kaj en ĉiuj sociaj tavoloj povas nur monda organizaĵo politike neŭtrala en la supre difinita senco.**

Senkompromisa persona deklaro

Sufiĉas. Por ĉiu racie pensanta homo estas klare, ke plua sukcesa laboro por Esperanto fariĝas absolute malebla en tiaj kondiĉoj de senrespondecaj atencoj kontraŭ ĉiujn premisojn de agado kaj ĉiujn objektivajn atingojn: estas komplete sence konstruadi ion tage, kion aliaj malkonstruas nokte. La dilemo estis: ĉu, do, silenti pri la danĝero — unu el la plej seriozaj, kiuj iam minacis ne nur la neŭtralan Esperanto-movadon, sed eĉ la estontecon de la lingvo mem — kaj retiriĝi de **kia ajn** plua laboro por Esperanto, rezignacie lasante, ke la afero ruliĝu direkte al abismo; aŭ prezenti la gravecon de la situacio al la tuta membraro, por ke ĝi, ekkoninte almenaŭ la plej esencajn faktojn, povu diri sian decidan vorton? Tiu ĉi artikolo montras, ke ankoraŭfoje la intereso de Esperanto venkis miajn personajn inklinojn en la aktualaj cirkonstancoj.

Nun okazas la elektoj por la nova Komitato, kiu difinas la politikon de UEA kaj de kiu grandparte dependas la estonteco de la Asocio. La aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj elektas kvindek da komitatanoj A. Espereble oni elektos la plej kompetentajn, meritplenajn personojn, kun bonaj konoj pri la eblecoj en siaj landoj kaj, samtempe, kun la necesaj mondaj perspektivoj. La ĉefdelegitoj kaj delegitoj, reprezentantaj pli ol 7000 individuajn membrojn, elektos nur 6 komitatanojn B (okaze de la sekva revizio de la Statuto

necesos doni al la individuaj membroj pli adekvatan reprezentigon). La komitatanoj A kaj B elektos en Hamburgo la komitatanojn C ĝis kvarono de sia propra nombro “por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj”.

Dum jaroj, ekde kiam mi ĉesis esti komitatano A de la Jugoslavia Asocio, mi estus povinta komforte akcepti kandidatigon kiel komitatano C, sed mi ĉiam preferis kandidatiĝi kiel komitatano B, ĉar mi deziris scii la starpunkton de la individuaj membroj pri mia laboro. En ĉiuj antaŭaj elektoj mi ĉiam ricevis pli multe da voĉoj ol kiu ajn alia kandidato, kio multe kuraĝigis min plu dediĉi miajn fortojn al la bono de nia afero. Ankaŭ nun mi povus glate esti elektita komitatano A de la aliĝinta jurista faka asocio, kies prezidanto mi estas, sed pli ol iam antaŭe mi ne nur deziras, sed fakte bezonas scii la starpunkton de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj por mia persona orientiĝo. Tial, laŭ la peto de multnombraj kunlaborantoj, el kiuj trideko da delegitoj kandidatis min al komitataneco B, mi akceptis plian fojon la kandidatigon. Do, mi estas unu el la 14 kandidatoj, inter kiuj feliĉe troviĝas kelkaj mondkonate meritplenaj por nia afero.

Nun, ne estu kia ajn miskompreno: persone mi neniam havis, nek povas havi kian ajn “ambicion” plenumi en la Asocio kiun ajn funkcion. Mia sola “ambicio” estis

kaj restas dediĉi *fruktodone* — ne sterile — miajn fortojn al afero, kiun mi rigardas unu el la plej gravaj en la historio de la homaro kaj unu el la decidaj por ĝia estonteco. En la prezentita nuna situacio de UEA, ne ia simpla plimulto, sed nur amasa apogo povos konvinki min — kaj verŝajne la aliajn multjarajn kunlaborantojn laŭ la sama linio — ke penvaloras daŭrigi laŭ tiu vasta vojo de progreso konforme al la principoj skizitaj enkonduke, kaj energie plukonstruadi surbaze de la ĝisnunaj atingoj. Se mi estos elektita per tia amasa apogo, mi rigardos tion ankaŭ kiel klaran mandaton liberigi la Asocion de tiuj evidentaj negativajoj, kiuj haltigis ĝian progreson kaj minacas ĝian ekziston, kaj kiuj havas nenion komunan kun sincera diskutado de problemoj kaj demokrata decidado. Se, male, mi ne ricevos tian plimulton, mi rigardos tion kiel malvenkon de tiu tuta idearo, kiu markas la modernan UEA kaj al kies formiĝo egale kontribuis centoj da kunlaborantoj kaj miloj da subtenantoj. Kaj mi foriros de ĉio sen amaro, liberigante tiel plene mian tempon kaj energiojn por mia faka, scienca laboro.

Estu absolute klare: aŭ oni plu deziras “havi Lapenna” sen abscesoj sur la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi.

Tio estas mia lasta, senkompromisa vorto.

Ivo Lapenna


DUM LA 59a UNIVERSALA KONGRESO EN HAMBURGO

Premio por medicinistoj

UNU EL LA PLEJ MALNOVAJ fakaj organizaĵoj, Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kiu estas samaĝulo de UEA, denove planas la aljuĝadon de UMEA-Premio por la plej bonaj medicinaj studoj aperantaj en la Internacia Lingvo. Tiaspecapropono estis diskutita dum UMEA-kunveno en la kadro de la 58a UK en Beogrado, kaj oni decidis, ke la Premio unuafoje estu donita dum la 13a UMEA-Kunveno en la 59a UK en Hamburgo.

La premia kapitalo konsistas el malavara donaco de la honora prezidanto de tiu ĉi faka organizaĵo d-ro H. Shinoda, ĉefdelegito de UEA por Japanujo. Temas pri granda sumo de 3 milionoj da japanaj enoj (ĉ. 30 000 gld.), el kies rento venados la premia mono. La Statuto de la Premio fiksas, ke unuopa premia sumo ne povas esti malpli granda ol 100 gld. kaj, ke la gajnintoj de la Premio, krom la mono ricevos ankaŭ specialan memor-medalon.

La donacinto de la premia kapitalo samtempe funkcias ankaŭ kiel prezidanto de aparta komitato, kiu aljuĝados la Premion. Kiam ni ĉe d-ro Shinoda interesiĝis



D-ro H. Ŝinoda, ĉefdelegito de UEA por Japanujo, antaŭa prezidanto kaj nuna honora prezidanto de UMEA, per sia malavareco ebligis restarigi la UMEA-Premion.

pri la konsisto de la Komitato de la UMEA-Premio, ni eksciis, ke ĝin enestas 15 elstaraj fakuloj, venantaj el Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Meksiko, Sovet-Unio, Pollando, Portugalujo kaj Japanujo.

Kandidato por la UMEA-Premio povas esti ĉiu medicinist(in)o, kiu inter du Universalaj Kongresoj publikigis valoran medicinan studon, kompreneble en la Internacia Lingvo. Ŝajnas, ke ĉi-jare tamen estos konsiderataj ankaŭ studoj, kiuj aperis iom pli frue, kvankam estas dezirinde, ke temu pri fakaj laboroj publikigitaj post la 58a UK, t.e. post la 12a UMEA-Kunveno. Cetere, d-ro Shinoda plenditis al ni, ke la kandidatigoj por la Premio ne tumultas, pri kio verŝajne grave ĵulpas la gazetaro, kiu nesufiĉe vaste diskonigis la refojan ekziston de la Premio. Ĉar la premia kapitalo kaj ĝia rento estas grandaj, oni antaŭvidas samtempan aljuĝon de tiom da premioj kiom da proponitaj studoj meritis UMEA-Premion. Ankoraŭ ne estas malfrue kandidatiĝi por ĉi tiu jaro, kaj tion oni faras uzante la adreson de d-ro H. Shinoda, Kasumicho 1-12-17, Yamagata-shi, Japanujo.



LA 59a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN HAMBURGO:

Post kvar monatoj

LA 1-AN DE APRILO 1971, grupo de aktivuloj en Hamburg deklaris al la Estraro de UEA sian pretecon aranĝi la 59an Universalan Kongreson de Esperanto en la nordgermana metropolo. Post akcepto de tiu oferto ili preparis dum la pasintaj tri jaroj la grandan manifestacion de la Esperanto-movado. Post kvar monatoj la kongresanoj estos jam survoje al Hamburg. La Loka Kongresa Komitato prilaboras la lastajn farendaĵojn. La kongresaj respondeculoj en la Centra Oficejo de UEA ĵus kompilis la programon de la kongressemajno. Nun la Kongresa Libro estas redaktata. La Estraro de UEA jam havis sian printempan kunsidon kaj fintraktis la detalojn de la definitivigota lukontrakto kun la kongresejo kaj la aliajn decidojn, kiuj apartenas al ĝia laborkatalogo. Ĉiuj instancoj rilatantaj al la Kongreso laboregas. Nur plu kvar monatoj!

Certe ankaŭ la esperantistoj jam fiksis siajn vojaĝplanojn por la somero de 1974. Ĝojige granda nombro decidis favore por kongrespartopreno. Ĝis la 25a de marto 1974 aliĝis 1 100 kongresanoj. Tiu nombro estas relative alta por Universala Kongreso en okcident-eŭropa grandurbo. La lokaj prilaborantoj vidas en tiu amasa aliĝado la reagon de la esperantistoj al la multaj klopodoj oferti eventoriĉan semajnon en Hamburg. LKK-membroj vaste propagandis la Kongreson en multaj Esperanto-gazetoj, antaŭ ĉio kaj nun la trian fojon, en la ĉeforgano *Esperanto*. Tiuj varbadoj estis

responditaj per aliĝoj. Bone vizitata kongreso ebligas pli da renkontiĝoj ol malgranda, kaj granda nombro donas taŭgan bazon por agrabla programo.

Malgraŭ principa kontento pri la aliĝado la disponebla spaco estus sufiĉa por ankoraŭ multaj kongresanoj. Estas tre dezirinde, ke ni en Hamburg havu pli da partoprenantoj, ol estas supozeble surbaze de la ĝisnuna anoncado. Tial ni alvokas nun veni al Hamburg ankaŭ tiujn esperantistojn, kiuj ĝis nun ne planis tion. Ofte diris al ni homoj alparolitaj pro kongresvizito, ke la streĉoj de la profesia laboro dum tuta jaro faras neeviteblaj ripozigajn feriojn. Tian karakteron la kongresa semajno ne havas. Kontraŭe, ĉiuj klopodas aranĝi daŭre ion, oferti travivaĵojn, persvadi ion fari kaj instigi al aktivecoj.

Kial ne pensi pri kompromiso? Ja la ferioj ne daŭras nur unu semajnon, sed plurajn, inter kiuj kongresa semajno povas esti vigliga elemento, kiu pliprofundigas la ripozigan efikon de la trankvila feriado. Hamburg ofertas sin ankaŭ kiel enŝovaĵon. Skandinavianoj veturantaj al sudaj landoj ĉiukaze preterpasos la urbon, enloĝantoj de pli sude situantaj eŭropaj landoj, celantaj al nordaj plaĝoj de la kontinento, same traveturos la nordgermanan vojkruĉigon, kaj de la brita insulo pramiŝipo kondukas vojaĝantojn survoje al la kontinento rekte en la havenon Hamburg. Por neeŭropanoj, Hamburg estas konata dum jarcentoj, granda pordego al

Eŭropo, de kie komenciĝas vojaĝoj tra la malnova kontinento. Tion ni memorigas pro kongresvizitoj survoje.

Aldone, la nordgermana ĉirkaŭaĵo de Hamburg estas fama feria regiono. La plaĝoj en Schleswig-Holstein, ĉe la Balta Maro oriente kaj sur la insuloj antaŭ la okcidenta marbordo, ĉiujare altiras centmilojn da homoj. Tie ferii estas simplege akordigeble kun partopreno en la 59a Universala Kongreso en Hamburg. La samo validas por la longaj marbordoj de la proksima Danlando. Kaj kvankam ni nepre deziras havi tutsemajnajn kongresanojn, ni ne prisilentas la eblecon partopreni la Kongreson nur dum kelkaj tagoj post la aĉeto de tagaj biletoj. Je tiuj kontribuoj al nia kaso ni ne povas rezigni, ĉar ni mem devas pagi por ĉio kaj do devas postuli la monon de la favoratoj. Komparante tiun monpostulon kun la oferto, ĉiu facile komprenos, ke ne nur Hamburg valoras vojaĝon, sed ankaŭ ĉiu unuopa kongrestago viziton.

Kun danko al la aliĝintoj la kongresorganizantoj en Hamburg alvokas la esperantistojn, kiuj ne jam aliĝis, rekonsideri siajn vojaĝplanojn. La favora situo de Hamburg ĉe la trafikvojoj faciligas tiun decidon. Multnombra vizitado pligravigas la Kongreson ankaŭ en la okuloj de la ekstera publiko. Tio signifas, ke kongrespartopreno havas ankaŭ varban efikon por nia afero. Ni povas aserti, ke la Internacia Lingvo estas kapabla solvi la mondlingvan problemon, sed ĉu la skeptikuloj kredas al ni estas necerte. (Spertoj montras, bedaŭrinde, ne ĉiam kontentigan eĥon je niaj intensaj klopodoj). Do ni devas prezenti pruvojn por nia aserto pri la



Hamburgo gastigos la 59an UK: la Urbodomo.

karaktero de Esperanto kiel vivanta lingvo. Tio eblas en kunvivadoj de homoj praktikantaj la lingvon, inter kiuj la kunestadoj en la Universalaj Kongresoj estas absolute elstaraj. Konsekvence, ni devas rigardi la Kongreson ankaŭ el tiu vidpunkto.

La Loka Kongresa Komitato dediĉis al tiu flanko de siaj taskoj multan atenton. Unu parto de tiu atentoveka laboro estis la gazetaraj publikigoj pri la Kongreso kaj pri la Internacia Lingvo. Ankaŭ gazetoj ĝis nun fermitaj por ni komencis informi pri Esperanto. Ofte ni ankoraŭ troviĝas sur la paĝoj de lokaj informoj, — ĉar la Kongreso estas sendube ankaŭ loka okazaĵo — sed la celo de la laboroj estas atingi la paĝojn prizorgatajn de la kulturaj redakcioj.

Dua celgrupo en la informlaboro de la lokaj kongrespreparantoj estis la politikistoj. Nur la okazigo de la Universala Kongreso donis la eblon sin turni al tre altaj instancoj kiel ŝtatprezidanto, ĉefministro, fakministro, ĉefurbestro kaj urbaj gravuloj. La invitvortoj de la ĉefurbestro de Hamburg estas parte jam konataj al la esperantistoj pro presigo en la Unua Oficiala Bulteno. La Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco atestis al ni: “Via celo estas la popolinterkompreniĝo, pli bona interkomprenado de homoj de ĉiuj rasoj kaj nacioj. La Kongreso kontribuu al la prosperigo de tiu celo”. Nun ankaŭ la ĉefministro de la Federacia Respubliko Germanujo, kanceliero Willy Brandt, nobelpremiito pri paco, honorigas la Kongreson per salutmesaĝo, en kiu li konstatas, ke la Kongreso kunigas homojn el multaj landoj kun diversaj lingvoj, “kiuj tamen komprenas sin per komuna internacia lingvo. Tio estas popolinterkompreniĝo en la plej vera senco de la vorto”. Jes, la kanceliero, la fakministro, la urbestro — ili pravas. Ni esperantistoj praktikas la pacigan interkompreniĝon inter la homoj, kaj kiel tio povas okazi, ni montras dum la mondkongresoj.

Jam post nur kvar monatoj komenciĝos la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburg. Ĉiuj intencoj rilate ĝin troviĝas en sia lasta stadio, ĉu la preparlaboroj de la aranĝantoj, ĉu la vojaĝplanoj de la esperantistoj ĝenerale. Necesas nun kunordigi tiujn du aferojn. Necesas, ke tre multaj esperantistoj ankoraŭ decidu iri al Hamburg. Ni sincere petas ĉiujn legantojn, kiuj ne jam fiksis siajn ĉi-somerajn veturplanojn, ankoraŭ enmeti la vojaĝon al Hamburg, fine de julio 1974, por kongresa semajno en la nova kongrescentro. La publika atento estas jam vekita. Gravaj respondeculoj de la urbo kaj de la ŝtato, samkiel la redakcioj de gazeto, radio kaj televido atendas la Kongreson mem, pri kiu ili antaŭe tiom aŭdis kaj al kiu ili dediĉis jam favorajn sentojn. Ni esperantistoj zorgu, ke iliaj atendoj ne restu sen realiĝo kaj, ke ilia bonvolo rilate Esperanton plifirmiĝu pro sukcesinta Kongreso. Por fari kongreson sukceson, unuavice necesas granda, vigla partoprenantaro. Venu al Hamburg, kunhelpu fari atentovekan kongreson per via kunlaboro kaj per via kongresĝuo. Hamburg valoras vojaĝon.

D-ro Werner Bormann
prezidanto de LKK

Spokane, urbo en la ŝtato Vaŝingtono en la nordokcidenta parto de Usono, ĉi-jare estos ofte menciata loko. En ĝi okazas la mondfoiro EKSPO '74, pri kio ĉi-sube raportas nia kunlaboranto Elwyn C. Pollock. Spokane tamen havas ĉi-jare ankaŭ aliajn, pli rektajn kialojn por gastigi sur niaj paĝoj: tie inter la 21a kaj la 23a de junio okazos la 22a Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko. Kvankam la Kongreso en sia programo ne havas erojn pri Ekspo '74, restas la bela ebleco kombini la viziton al ambaŭ aranĝoj.

La medio de morgaŭ

CIRKOJ, KARNAVALOJ, foiroj, kermesoj kaj festivaloj estas relative efemeraj okazaĵoj, aperantaj kaj malaperantaj foje en la daŭro de nur unu sola tago. Tamen, ili ja estas granda parto de la homa vivo sur ĉiuj kontinentoj; ili nin provizas per la necesa distro, forturnante la spiriton de la ĉiutagaj zorgoj. Aliflanke, ankaŭ la mondfoiroj, internaciaj ekspozicioj, ĉiam pli



Spokane gastigos la mondfoiron Ekspo '74 inter majo kaj oktobro ĉi-jare.

kaj pli fariĝas esenca parto de la kreiĝanta internacia tradicio. Tamen, almenaŭ ĝis nun, la mondfoiroj funkciis por milionoj da turistoj, kiuj povis ilin ĉeesti, nur kiel granda iluzio en la senfinaj klopodoj krei pli bonan kaj pli humanan mondon. Plejparte la mondfoiroj estis nur grandega ekspozicio, kies celo estis montri la plej mirindajn eltrovaĵojn en la mondo de scienco, teknologio kaj industrio, la lastajn atingojn en la sferoj de artoj kaj sportoj, la plej novajn mal-kovrojn en la kampoj de folkloro aŭ kultura historio. Pro ĉio ĉi Ekspo '74, la ĉi-jara mondfoiro, altiras apartan atenton per sia ĉeftemo — la homa medio — des pli, ke temas pri la unua mondekspozicio dediĉita al la temo tiom ofte priparolata dum la lastaj jaroj. Ekspo '74 aŭ “la plej brila, la plej signifoplena mondfoiro de Ameriko” — kiel oni kutimas reklami ĝin — malfermiĝos la 4an de majo 1974 en la urbo Spokane, ŝtato Vaŝingtono, en la koro de la plej spirhaltiga vidindaĵo de Ameriko: la pacifika nordokcidento. La sola mondfoiro en Usono dum tiu ĉi jardeko, Ekspo '74 estis oficiale sankciita de la pariza centro pri internaciaj ekspozicioj kaj ĝi akiris ankaŭ la etikedon de aranĝo honore al la ducentjara ekzisto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.

La ekspozicio okazos sur impona scenejo — apenaŭ imageblas pli konvena loko por tiutema aranĝo — du insuloj meze de rivero, ĝuste en la centro de la urbo Spokane. Tiuj du insuloj estis longe forlasitaj de la urbo, kaj unu el ili antaŭe funkciis kiel fervoja deponejo por ruba ekipaĵo. Nun, ĝuste dank'al la mondfoiro, tiu antaŭa rubejo de Spokane transformiĝis en agrablan freŝan medion, reakiritan por la homo. En Spokane oni atendas la partoprenon de la plimulto de landoj el la tuta mondo, kiuj venos demonstri siajn atingojn, sed oni nepre devas akcenti la ĉeftemon de la mondfoiro, — “la freŝan, novan medion de la morgaŭo”. Efektive, la tuta ekspozicio (kiu cetero kostos ĉ. 70 milionojn da dolaroj) klopodas efike ilustri la vekiĝintan konscion de la homo pri sia natura medio, pri sia ĝusta loko en tiu medio. Oni ne nur atendas, ke Ekspo '74 havos edukan efikon ĉe tiuj, kiuj povos viziti ĝin de majo ĝis oktobro (kiam ĝi fermiĝos), sed oni planas konservi grandan parton de la ekspozicio, kun celo, ke ĝi servu kiel daŭra atentigo kaj leciono al la homoj. La ĉefaj ekspoziciejoj transformiĝos en novan kulturan centron por la tuta nord-okcidenta parto de Usono.

Grava evento en Usono

La forto de la internacia Esperanto-movado ne ekzistas kiel aparta, pli—malpli sendependa sumo de iaj propraj potencialoj. Plej realece ĝi esprimiĝas tra la forto de ĉiu unuopa Landa Asocio kaj ĝi eĉ estas nenio alia ol sumo de la potencialoj de ĉiuj aliĝintaj kaj kunlaborantaj organizaĵoj. La usona Landa Asocio lastatempe elkreskas en unu el la plej fortaj naciaj Esperanto-organizaĵoj.

LA ESPERANTO-MOVADO en Usono montras tre atentindan progreson dum la lasta jardeko. Kvankam nur parte, tion bele montras ankaŭ la statistiko pri la individuaj membroj de UEA en tiu vasta lando dum la lastaj jaroj: en 1961 UEA havis en Usono 352 individuajn membrojn, en 1967 tie estis 425, kaj en 1973 la nombro atingis 621, minacante tiel Francujon, kiu jam dum pluraj jaroj en tio okupas la unuan lokon. Ĉion ĉi oni grandparte devas danki al Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA), aliĝinta landa asocio de UEA.

Antaŭ nelonge en Usono okazis plia grava evento, kiu certe kontribuos al plua progresigo de la Movado en



En la nova Centra Oficejo de ELNA: s-ro Ch.R.L. Power (sidanta) kaj ges-roj Schulze.

tiu lando: ELNA realigis siajn malnovajn planojn pri instalo de propra oficejo de la landa asocio, kiu samtempe prizorgus la administradon, eldonadon de la dulingva organo *ELNA Newsletter*, informadon kaj libroservon. La nova Centra Oficejo de ELNA estas en la dua etaĝo de komerca konstruaĵo en San Mateo, sed la poŝta adreso restas: P.O.Box 508, Burlingame, CA 94010, kio antaŭe estis la adreso de Informa Centro kaj libroservo, dum jaroj sukcese gviditaj de ges-roj Schulze.

La Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA fariĝis s-ro Charles R.L. Power, kiu ĉe UEA estas notita kiel “membro-abonanto kun *Kontakto*”, kio klare sugestas, ke temas pri juna homo, kio siavice povus montriĝi avantaĝa por ELNA. Eksciinte la novaĵon pri la instalo de la Oficejo kaj posteniĝo de s-ro Power, ni skribis al li kaj petis pliajn detalojn pri la afero. Jen parto de la respondo de s-ro Power:

“Dum multaj jaroj ELNA funkciigis informcentron en Nov-Jorko sub prizorgo de kelkaj bonvolemaj personoj, sub la gvido de s-ro Mark Starr, kiuj aŭ tute ne ricevis salajron aŭ, maksimume, ricevis kelkcentdolaran jaran honorarion. La redaktoro de la organo de ELNA ofte estis persono en tute alia parto de nia vasta lando, kio malhelpis efikan kunordigon de la agado. Ne ekzistis Liga libroservo, sed kelkaj privataj libroservoj kontentigis la bezonojn de la usona esperantistaro.

Unu el la privataj libroservoj estis tiu de ges-roj Schulze de Kalifornio. Por helpi al ELNA, ges-roj Schulze aldonis informservon al la libroservo kaj per ĝi varbis por la Ligo.

En 1973, pluraj faktoj evidentigis bezonon por ŝanĝo de la agadmaniero de ELNA. Unue, oni jam en 1972 fermis la novjorkan informcentron pro la fakto, ke la kalifornia informservo tiel bone funkciis. Dume, pro la UK en Portlando, la ĉiusomera kursaro de William Auld ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato, kaj diversaj aliaj faktoroj, kreskegis la intereso pri la Internacia Lingvo. Tiel ges-roj Schulze trovis sin neelteneble superŝutataj de informpetoj. Cetere, ili tiam havis la solan glate funkciantan libroservon, kio signifis multe pli da laboro. Sekve, ili anoncis al ELNA, ke ili ne plu pretas fari ĉiujn ĉi laborojn, kaj aŭ transdonos ilin al la Ligo aŭ tutsimple forlasos ilin.”

Laŭ la januara-februara numero de *ELNA Newsletter*, oni lanĉis kampanjon por financa subteno de la planoj ligitaj al la Oficejo kaj jam alvenis kelkaj kontribuoj. En la kason de la Oficejo iris ankaŭ la sumo, kiun UEA pagis al ELNA kiel profiton de la 57a UK en Portlando (temas pri iom pli ol mil usonaj dolaroj), kaj tien verŝajne iros ankaŭ la same granda sumo el la parto de la profito de la 57a UK, pagita al la Loka Kongresa Komitato en Portlando mem.

Evidente, ELNA havas ambiciajn planojn kun sia nova Oficejo kaj ĝenerale kun sia agado, des pli, ke oni en la menciita numero de ĝia organo — modest-aspekta sed tre bone redaktita — trovas ankaŭ jenajn frazojn: “... ĉar tute aparte de la ŝovinismo nacia, estas klare, ke Usono ludas kaj ludos gravan rolon en la monda kulturo. Por ke ĝi ludu rolon ankaŭ en la plej grava realigo de monda kulturo, lingvo internacia, ELNA devas esti forta.” La akiro de la propra Oficejo certe influos pluan plifortiĝon de la usona Movado, kiu dum kelkaj lastaj jaroj ekhavis ankaŭ alian gravan kvalitan dimension — ĉeston de tuta aro da kapablaj junaj lingvistoj, pri kies aktiveco ni jam plurfoje raportis.

PARTOPRENO EN INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ EN 1972

En 1973 CED entreprenis enketon kun la celo establi la nombron de internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj, ferioj, kursoj kaj aliaj renkontiĝoj, okazintaj en 1972, en kiuj Esperanto estis la sola oficiala lingvo. La demandfolioj estis senditaj al ĉiuj organizintoj de tiaj renkontiĝoj, al kelkaj eĉ plurfoje. Alvokoj aperis en la rubriko de CED. Kompreneble, estis senditaj ankaŭ urĝigaj leteroj. Rezulte de tiuj klopodoj, CED povis kunmeti statistikan trarigardon, kiu estas ĵus publikigita kiel aldono al la dokumento I/II/32 "Internaciaj Esperanto-renkontiĝoj en 1972".

La statistiko montras, ke en tiu jaro entute okazis 50 internaciaj renkontiĝoj en 24 landoj. La nombro de ĉiuj partoprenintoj estis 11 285. En tiu jaro la UK okazis en Portland, do sufiĉe malproksime de la landoj kun forta Esperanto-Movado. Tio eksplikas la relative malgrandan nombron de aliĝintoj kaj partoprenintoj. Ĉar en la lastaj jaroj la meza nombro de partoprenintoj en Universalaj Kongresoj estis 2 100 personoj, oni povas taksu, ke nuntempe ĉiujare ĉ. 12 500 personoj partoprenas internaciajn kongresojn, konferencojn kaj alispecajn renkontiĝojn.

La Dok. I/II/32, kiu en la aldono enhavas ĉiujn detalojn, estas sendita al la landaj asocioj kaj al ĉiuj abonantoj de la CED-dokumentoj.

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ EN 1973

Laŭ la statistiko, ellaborita de s-ro G. Larglantier, multjara kunlaboranto de CED pri la radio, la nombro de ĉiuj elsendoj en la Internacia Lingvo en 1973 estis 3 259, kompare kun 2 354 en 1972. La elsendoj entute daŭris 1 110 horojn, kompare kun 875 horoj en 1972. Necesas tamen aldoni, ke en la nombro de elsendoj estas inkluzivitaj la kursoj de Esperanto, kiujn disaŭdigis minimume 8 radio-stacioj en Usono kaj kiuj konsistis el minimume 1 200 elsendoj dum 300 horoj.

La nombro de stacioj estis 22 en 12 landoj, inkluzive la menciitajn 8 staciojn en Usono, kompare kun 17 stacioj en 14 landoj en 1972. Dum la jaro 1972 ĉesigis la elsendojn Tananarive, Tallinn kaj Columbus, Ohio. Aliflanke, aldoniĝis la 8 radio-stacioj en Usono. Plej multajn elsendojn havis radio Varsovio (730), kiu, krome, prezentis 156 pliajn programojn. Radio Pekino okupas la duan lokon kun 312 programoj. Radio Bern havis 208.

CED atentigas, ke, se oni esceptas la kursojn en Usono, la nombro de elsendoj, radiostacioj kaj daŭro malkreskis kompare kun la antaŭa jaro. Apenaŭ necesas emfazi la gravecon de la elsendoj en la Internacia Lingvo. Por vastigi la aplikon de Esperanto sur tiu gravega kampo necesas ne nur aŭskulti la elsendojn,



"Grupo Kvin" klopodas penetri en la radion kaj televidon de Britujo. Tamen, necesas agi ankaŭ en aliaj landoj, eĉ tie kie jam ekzistas Esperanto-elsendoj, ĉar estas grave konservi la jam akiritajn poziciojn.

sed ankaŭ skribi al la radio-stacioj por firmigi la pozicion. Necesas ankaŭ klopodi enkonduki la lingvon en aliajn radio-staciojn, utiligante tiucele la jam atingitajn rezultojn.

BAZAJ FAKTOJ: 17 ELDONDOJ EN 13 LINGVOJ

La konata Dok. CED/7 "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo" entute ĝis nun aperis en 17 eldonoj en 13 diversaj lingvoj. Aldone al la pli frue menciitaj eldonoj en diversaj lingvoj, en 1972 aperis la dua hispana eldono kaj la tria angla eldono, ambaŭ ĝisdatigitaj. Ĝi estas la plej populara dokumento de CED, kiu en plej konciza formo prezentas la bazajn faktojn pri la Internacia Lingvo.

En ligo kun tio CED atentigas, ke en artikolo publikigita en la januara-februara numero de *La Brita Esperantisto*, troviĝas, inter multnombraj aliaj malĝustaĵoj, ankaŭ la aserto, ke kvazaŭe CED "fanfarone parolas pri aplikoj de Esperanto, kiuj esence ne konformas al la vero". La aŭtoro de la artikolo citas el unu el la eldonoj de tiu dokumento en Esperanto, en kiu estis dirite, ke "kreskanta nombro da gravaj industriaj, komercaj kaj trafikaj entreprenoj, praktike uzas Esperanton por reklamoj, prospektoj kaj alimaniere". Tio, kompreneble, estas absolute ĝusta. Malprava kaj malĝusta estas la komento, ke "tio neniel signifas, ke la kompanioj utiligas aktive Esperanton en sia internacia korespondado, varbado aŭ informado". La dokumen-

to de CED ne diras tion; krome, efektive sufiĉe granda nombro da komercaj firmaoj uzis kaj plu uzas Esperanton ankaŭ por korespondado. EKI devus scii tion.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO

La progresado de la teknika laboro je la monumenta verko de CED, pri kiu aperis detaloj en la novembra Esperanto (p.184), ne estis tiel kontentiga, kiel oni povis esperi. La prokrastojn rilate ilustraĵojn kaj enpaĝigon kaŭzis unuavice la troa okupiteco de la teknika redaktoro, kiu samtempe estas direktoro de la CO. Nun la situacio pliboniĝis kaj la teknika redaktoro firme esperas, ke la libro aperos plej malfrue en junio.

NOVAJ DOKUMENTOJ DE CED

Dum kelka tempo ne povis esti publikigataj la dokumentoj de CED, ĉefe pro la escepte granda okupiteco de ĝia honorofica direktoro, interalie ankaŭ en ligo kun *Esperanto en Perspektivo*. Nun tiu tasko estas


ĝisdatigita. Dek unu dokumentoj estas jam finpretigitaj kaj nun multobligataj en la CO. Ĝis la komenco de aprilo certe aperos almenaŭ kelkaj pliaj dokumentoj, tiel ke la programo por tiu ĉi laborjaro estos plenumita.

DONACOJ POR CED EN 1973

	£
Stato je la 5a de oktobro 1973.	170,13
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	2,00
S-ro E. Burg, Nederlando	0,80
Gesinjoroj David Kennedy, Britujo	5,00
F-ino M. Meijwes, Nederlando	1,54
S-ro M. van Aelst, Belgujo	1,07
S-ro E. Burg, Nederlando	0,38

Stato je la 31a de decembro 1973 £ 180,92

Al ĉiuj donacintoj koran dankon, speciale al tiuj subtenantoj de CED, kiuj regule, ĉiujare, kontribuas laŭ siaj eblecoj al la laboro de tiu ĉi institucio, esence grava por la progresigo de Esperanto.



Kongresa Komunikilo

59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 – 08 03

Alta Protektanto: D-ro Kläus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo.

Plia karavano al Hamburgo

Anoncis karavanon ankaŭ Japana Esperanto-Instituto. Organizas ĝin s-ino Yukibo Isobe (p/a JEI, Hongo 2-2-14, Bunkyô-ku, Tokio 113).

Ekspozicio pri TEJO

Ĉi-jare oni sufiĉe frue komencas preparojn por la Junulara Tago en la kadro de la 59a Universala Kongreso en Hamburgo. En la februara n-ro de NNN/Info/KER-informoj oni anoncas planojn organizi en la kadro de la Junulara Tago – ekspozicion pri TEJO. Tiun ĉi aranĝon prizorgas Franko Luin (Myggsdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo), kio certe promesas altan fakan nivelon de la ekspozicio, ĉar Franko Luin estas specialisto en tiu kampo. Tamen, tiuj kiuj estas pretaj kaj opinias sin mem kompetentaj

por kunhelpi, bonvolu uzi la adreson de la prizorganto por fari sugestojn kaj proponojn.

Ankaŭ hungaroj karavanas

Karavanvojaĝon al Hamburgo – pageblan en forintoj – anoncas Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, H-1443 Budapeŝto, Poŝtkesto 153 (poŝta ĉekkonto: OTP 511-212598). La prezo – ĉ. 7500 forintoj – entenas ĉiujn elspezojn, inkluzive de pasporto kaj vizoj, loĝado en Hamburgo, manĝoj, trajnveturo kun dormvagono kaj poŝmono.

Programo baldaŭ definitiva

Fine de marto la vicedirektoro de la Centra Oficejo de UEA, s-ro Simo Milojević, veturis al Hamburgo por i.a. surloke ellabori la definitivon programon de la Kongreso interkonsiligi kun LKK kaj kun la respondeculoj de la kongresejo. En la kunsido de la Estraro de UEA de la 5a ĝis la 7a de aprilo la programprojekto estis pridiskutita kaj finaprobata.

Limdato por anoncoj proksimiĝas

Esperanto-eldonejoj, asocioj kaj aliaj, kiuj konsideras reklami en la Kongresa Libro de Hamburgo, havas ankoraŭ tempon por tion mendi nur ĝis la fino de aprilo. Ni memorigas pri la prezoj: por tuta paĝo 100 germanaj markoj; por duona paĝo 70 g.m.; por kvarona paĝo 40 g.m. Interesitoj bv. turni sin al la konstanta adreso en Rotterdam.

Verdikto la praktiko

Recenzas István Szerdahelyi (Hungarujo):

Esperanto en lingvolaboratorio, de Hermann Behrmann. Löhne: Esperanto-eldonejo, 1973. 69p. 21cm.

Esperanto programita, aperinta antaŭ kelkaj jaroj, akiris meritan popularecon sur ĝermanlingvaj teritorioj. Ĝia materialo estas viva kaj aktuala kaj havas grandan avantaĝon kompare al la antaŭaj kursoj: ĝi liveris du-median lernofonton, — apud la grafika (kajeroj) ankaŭ akustikan (diskoj). La recenzata Suplemento (laŭ la antaŭparolo) ebligas surbendigon de la esenca materialo kaj per tio certigas pli aktivan ekzercadon. Sed por ke tiu ĉi materialo estu vere “laboratoria” oni nepre devas ĝin kompletigi aldonante paralelan diafilmserion (pri vid-efekta materialo la aŭtoro nenion mencias).

La materialo konsistas el vico de strukturismaj ekzercoj, tre similtipaj kaj pro tio, post iom da tempo monotonaj. Lingve ili estas ĝenerale korektaj kaj aktualaj, situacie vivaj.

Tamen estas riproĉenda la titolo “programita”: tiu ĉi materialo nek laŭforme, nek enhave havas iun rilaton al tio, kion hodiaŭ oni ĝenerale nomas “programita”. Laŭforme ĝi sekvas neniun el la ĝis nun konataj tipoj (linia, disbranĉita, algoritma). Enhave: en la segmentado, dozado kaj organizado de la materialo oni ne povas rimarki ian ekzaktan programon. La programado ja komenciĝas per la ekzakte mezuritaj bazdokumentoj (ekz. laŭfrekvenca kompleksa minimumo), la dozado devas esti strikte proporcia, certigante la ĉiam revenantan ripetigon, certan frekvencon al lingvo-elementoj laŭ ilia koeficiento de absoluta kaj relativa malfacileco, la reanekson kaj memkontrolon ktp. Tiuj ĉi principoj tute ne realiĝas en la studmaterialo, kies organizado, simile al la ĝisnunaj tradiciaj lerniloj, estas subjektiva, hazarda kaj arbitra. Ekz. kelkajn malfacilajn fenomenojn ĝi nur tuŝe preteriras, aliajn, malpli komplikajn kaj malpli gravajn, ĝisnue ekzercigas. En la deiro oni sentas certan klopodon al la aŭtomatigo, sed poste tiu tendenco perdiĝas dum la plivastiĝo de la materialo.


La mankon de ekzakta material-planado montras tuj en la unua leciono la troabundo de dekoj da strangaj nomoj. Estas erara penso ne konsideri la onomastikon kiel vortojn kaj ŝutadi ilin senkalkule. En la 1-a ekzerco de la leciono 1/a tuj aperas 20 tiaj nomoj, unu pli stranga ol la alia. Superflua balasto!

Nek la strukturoj estas programitaj. En unu sola ekzerco (la unua) aperas tre variaj strukturoj, tuj dek

diverstipaj variantoj. El tiu strukturo-vico evidentiĝas, ke la materialo startas per akuzativo, antaŭ ol koni la nominativon; tuj poste sekvas la akuzativo de la adjektivo en akordiĝo, kategorio fremda kaj nekonata en multaj lingvoj; ĉe la verbo la unua formo estas ne indikativo, sed tuj la volitivo. En la naciaj lingvoj, pro situaciaj kaŭzoj, oni lastatempe preteratentas la gramatikan konsekvencecon. Sed ĉu en Esperanto ni devas imiti tion? Mi dubas. Same dubinda estas la efikeco de nura ripetado de certaj izolitaj vortoj, verŝajne konsiderataj internaciaj, do jam potenciale konataj de lernantoj. Estas kategoria principo de la moderna instruado: neniam prezenti kaj ekzercigi izolitajn vortojn. Sed ankaŭ la internacieco de tiu vortlisto estas kontestebla: almenaŭ 6-8 el tiuj vortoj diras nenion por slavo, eĉ malpli por la ne-eŭrop-lingvanoj. (Kp. por hungaroj: vino - *bor*, lakto - *tej*, apetito - *étvágy*, glaso - *pohár*, akvo - *víz*, taso - *csésze*, biero - *sör*). Ke la aŭtoro pensas precipe en sia propra lingvo aŭ maksimume en eŭropaj lingvoj, demonstras la imita ekzercigo de prepoziciaj sintagmoj, karakterizaj por eŭropaj lingvoj sed tute fremdaj, sekve problemaj, por la ceteraj lingvanoj. (El la listigitaj apartan plusan problemon kaŭzas *por* — paronimanta kun *pro*, same *tra* kontraŭ *trans* kaj *kun* - *per* en multaj lingvoj nedistingeblaj!) Sekve: la lernilo neniokaze estas nomebla “internacia” sed maksimume: eŭropa.

Fine, ne teoriaj konsideroj sed la praktiko demonstras la valoron de iu lernilo. Kaj la ĝisnuna praktiko demonstris, ke malgraŭ certaj metodologiaj mankoj, la kursmaterialo estas uzebla almenaŭ tiom sukcese, kiel la aliaj similtipaj, lastatempe aperintaj lerniloj.

Mendu ĉe UEA: 5,40 (por Nederlando 5,62) gld. plus sendokostoj 10%.



Hermann Behrmann jam organizis plurajn sukcesajn lingvolaboratoriajn kursojn de Esperanto.

Timiga erudiciulo

Recenzas Ivo Rotkvić (Jugoslavio):

Ni kaj Ĝi (Eseoj III), de Gaston Waringhien. La laguna: J. Régulo, 1972. 344p. 22cm.


Jen mirinda libro, tiel mirinda mi dirus, ke eĉ se nur por ĝin tralegi, penvalorus ellerni Esperanton. Tio estas la tria globeto en la esea perloĉeno de la aŭtoro kaj ĝi enhavas du temojn: pri religio kaj pri arto.

Legante la libron oni klare vidas, kiel ĉiu religio, same kiel iu ajn ideologio, kreas sian propran kosmon kun nur sia gravito, kun ekskluzive sia stelumita ĉielo, kun sennombraj versimiloj el fumaĵo de tuŝimunaj mitoj, revoj kaj legendoj. Ho, kiom da instruoj por la orientiĝo en la ĥaosa ĉiutago!

La aŭtoro, mangvide, incas nin en la ekzegezo de la *Nova Testamento* en la misteroplenan kosmon de kristanismo. Ĝian religian doktrinon li elfadenas el la jam dekadencia Mediteranea Ĉirkaŭmondo, post kiam okazis sinkretismo de pluraj elementoj: babilona mitologio, hebrea kabalo, egipta adoro de dio-faraono, persa dualismo kaj idealismaj konceptoj de greka filozofio. En la sankta figuro de Jesuo-Kristo estas sintezita fundamenta gnostika ideo pri la Mesio, la ideo, kiu jam ekzistis en la tiuregiona religia eklipsiĝo; pri la Savonto, senpere deveninta el la Dio mem, venonta en la mondon por starigi la Regnon de Dio kaj elsavi la kredkonfesantojn. Sendube Kefas-Petro en la tempo de sia foriro el Jeruzalemo en Romon, la tiaman mondocentron, ne povis antaŭvidi malgraŭ siaj vizioj, la gigantan religian riveron, kiu ekfontos el la Biblio kaj disruliĝos super granda parto de nia terglobo. La evangelia mesaĝo, ke sole Jesuo-Kristo per la unuiĝo de la homa naturo kun la dia en unu sola persono — kiel dekretis la Kalcedona koncilio (451 j.) — celis levi la homan animon en dian sferon el la vivo, ĉar ĝi esence pli ol superas la nuran homan naturon. Neniu povos forkaŝi siajn agojn antaŭ la Dio-Patro, kiu iam venos por la Lasta Juĝo super justuloj kaj pekkulpintoj.

Analizante kontribuojn de la kristanismo en la ĝeneralan civilizon, Waringhien sukcesas, surprizfrape, elpalpi la nepripalpeblan, eltrovi la nevideblan kaj tralumi la nekredeblan. Kaj malgraŭ tio, ke la homa racio havas siajn limbarojn kaj ke la kredo estas senlima, ni tamen ofte, sub lia pruvinfluo, ĉesas kredi kaj komencas scii!

Multaj eble miros, ke sub la sama kovrila tegmento troviĝas interligitaj pritraktoj de religio kaj arto. Sed jen hakpeceto el la belega aŭtora komentario: "la arto estas, kun la religio kaj la scienco, unu el la vojoj, per kiuj la homa animo kapablas komunikiĝi kun la plej intima de la realo, kaj eble eĉ kun tio, kio kuŝas trans tiu realo, la sennoma, nekonebla Ĝi. Iluzio eble, aŭ eĉ probable, sed iluzio, kiu donis sencon al la vivo de tiom da homoj, kiuj riĉigis nian socion je tiom da



Prof. Gaston Waringhien: Plia ĉefverko aperis sub la marko de "Stafeto".

ĉefverkoj, kiu plu provizas nin per tiom da ĝojfontoj, ke forrezigni ĝin ŝajnas pli malsaĝe, ol ĝin akcepti vera."

Gaston Waringhien denove etendas al ni verkon, kies ĉiu pago — laŭ sia karata valoro — estas nesupertaksebla. Timige impresa erudiciulo kaj enciklopediisto, ĉiam en rezonado ĝisradike honesta, li en belega literatura stilo diskurtenis al ni du el la plej delikataj homaj problemoj neofendante la intimon de iu ajn. Resume la libro estas profunda deponejo de la spiritaj trezoroj, kiuj nepre devus esti konsistiga parto en scioposeda de ĉiu klera homo.

Fine mi aldonu, ke la ĉapitro: "Revoj" estas io plej bela, kion mi ĝis nun legis pri la "roza bebo, kuŝanta sur garbo de pajlo, inter la bovo kaj azeno". Nepreterirendaj senrimarke estas ankaŭ liaj "Pensoj el hospitalo", kiam liaj saĝolumaj, trapenetraj okuloj, post la dusemajna ekzilo en la nokton, veropese esploras la sencon kaj valorojn de la homa vivo. Kaj mi kredas, ke ĉiu traleginto de la libro pie klinos la kapon antaŭ "la figuro de milda kaj korhumila ĉarpentisto el Galileo", ĉiutage denove krucumata pro la pekoj de ĉiu el ni!

Mendu ĉe UEA: 18,— (por Nederlando 18,72) gld. plus sendokostoj 10%.

Frapo kontraŭ malfermita pordo

Recenzas C. Conterno Guglielminetti (Italujo):

Vojo kaj Vorto, de Roberto Passos Nogueira. La Laguna: J. Régulo, 1972. 110p. 19cm.

Se ĉi-foje mi estos drasta, la leganto pardonu min: ĉar la aŭtoro ja certe ne pardonos.

Auld diras en la antaŭparolo, ke Nogueira verkis siajn poemojn “por malfermi novajn vojojn por la poezia esprimo en Esperanto”. Li ne malfermis novajn: li nur fermis la malnovajn. Signife estas, ke la unua originala poemo estas en la angla: ja ankaŭ la internacia lingvo elmodiĝis: la angla estas la vera nova Esperanto.

Deziro reagi kontraŭ la parnasismo? Jes, por krei novan parnasisman. Jen la kutimaj ŝablonaĵoj: merdo, urino, priskribo de koito, iom da Kristo tie kaj tie,

aliteracioj, tipografiaj strangaĵoj, manko de signifo, kaj paĝoj preskaŭ tute blankaj. Ĉi ĉion ni konas parkere, ni ĝin vidis tiom da fojoj, ĉiulingve. Nu, ni ne povas diri, ke Nogueira ne reprezentas sian tempon, t.e. la nunan. Kaj tamen, kia delikata poeto li povus esti, se ni juĝas el la nemultaj juveloj kiuj briletas disemitaj en la halucinaĵoj: “la dolĉan humilecon de l’malvenko”, aŭ “per la nenio oni iras al ĉio”.

Venas poste tradukoj el modernaj famaj poetoj, kun bonegaj vort-elektoj, ĝenerale tre trafaj kaj prizorgitaj, kiuj konsistigas la du trionojn de la libro. Ilia enhavo tamen rekondukas nin al la temoj karaj al la tradukintoj (ĉar al Nogueira aldoniĝas Socorro Sampajo): iom da Kristo tie kaj tie, nekomprenebleco, ho-kiel-maljusta-estas-nuna-socio, kaj tiel plu.

La mallonga eseo pri moderna poezio kaj Esperanto, kiu fermas la libreton, teoriumas pri la modernismo kaj kontraŭ la rigideco de *Parnasa gvidlibro*, forgesante, ke ĉi tiu lasta, jam pli ol 40-jara, prezentis latiaman situacion, ne la nunan. Multe da akvo — kaj ve, kia akvo! — pasis sub la pontoj, de tiam ... La skuo, kiun Nogueira, junul-flame, volas doni al la “eburaj turoj” estas ja nobla afero... Sed, ĉu li ne frapas kontraŭ delonge malfermita pordo? Kaj ĉu li vere kredas, ke liaj originalaĵoj kaj la tradukitaj pecoj estas (ĝenerale!) io alia ol “konceptoj abstraktaj” kaj efektive “komunikas ion”?

Kion vi volas? ... ”...kaj el tiu periodo restas al ni nur krudaj potoj”, konstatos la posteuloj pri la civilizo, kiu senhelpe dekadencas. Nogueira ne kulpas.

Mendu ĉe UEA: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Esperanto dla kaŝdego (1973) J.P. Bieliński. 32p. 21cm. Broŝ. 1,50 gld. Tekstaro por korespondaj kursoj.

Glumarkoj de la 30a Internacia Junulara Konferenco (1974) 9 glumarkoj en folio. 0,50 gld.

G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon (1974) G. Marin (1883-1969). Redaktis M. Gjivoje. 80p. 17cm. Broŝ. 3,— gld. Elektro el la taglibroj kaj aliaj paperoj de multe vojaĝinta esperantisto.

Kio estas, kion volas, kion faras la Eŭropa movado (1974) 14p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Ĝeneralaj informoj pri la Eŭropa movado, precipe en Nederlando.

Komerca-ekonomika vortaro, Internacia (1974) F. Munniksma k.a. 535p. 22cm. Bind. 57,50 gld. Enciklopedia vortaro por komerco kaj ekonomiko, kun difinoj en la angla kaj Esperanto, kaj tradukoj en germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala, kaj sveda lingvoj. Kun 8 indeksoj por la diversaj lingvoj, kaj tabelo de landoj kaj valutoj.

Kompleta lernolibro de regula Esperanto (1973) L. Mimó. 189p. 21cm. Broŝ. 17,70 gld. 31-leciona gramatiko sistema, verkita laŭ logikisma vidpunkto. Fine troviĝas kelkaj specimenaj literaturaĵoj.

Lanternisto, La Diversaj aŭtoroj. El la pola trad. K. Bein (1905). 207p. 20cm. Broŝ. 10,20 gld. 23 noveloj, de Sienkiewicz, Niemojewski, Orzeszko, Prus, k.a. Fotorepreso 1973 de la dua eldono, kiu estis reviziita fare de la Literatura Komitato de FLE.

Modela prononco de la interlingvo Esperanto (1973) A. Lienhardt. 16p. 24cm. Broŝ. 0,90 gld. Artikolo aperinta en *Scienca Revuo*.

Morsoklubo; Trezoro-serĉado R. Fisker. El la dana tradukis G. Riisberg (1973). 31p. Ilus. 21cm. Broŝ. 1,80 gld. Du rakontetoj por mezgrandaj infanoj.

Potencrilatoj inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj sur lingva kaj kultura terenoj (1974) Div. aŭtoroj. 29p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Tri artikoloj pri problemoj de lingva-kultura imperiismo.

Potencrilatoj en Eŭropo sur lingva kaj kultura terenoj (1974) Div. aŭtoroj. 16p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Kvin artikoloj pri la socia, politika kaj ekonomika flankoj de la lingva problemo interne de Eŭropo.

Wereldtaal gevraagd (1973) M. Pei. 33p. 22cm. Broŝ. 0,90 gld. Nederlandlingva traduko de la anglalingva informbroŝuro *Wanted, a world language*.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k. c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

STUDENTA INTERLINGVISTIKA
SEMINARIOVarsovia
scienca rondo

Interlingvistika Scienca Rondo de studentoj de la Varsovia Universitato organizas inter la 1-a kaj 5-a de majo 1974, en Varsovio, studentan interlingvistikan seminarion. Tiu ĉi aranĝo, dum kiu oni dediĉos apartan atenton ne nur al la interlingvistiko, sed ankaŭ al kelkaj aspektoj de la instruado de Esperanto kaj de fremdaj lingvoj ĝenerale, estas daŭrigo de plurjara sukcesa aktiveco de la Rondo. Fondita en la studjaro 1971/72 kaj aktivanta sub la patroneco de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, Interlingvistika Scienca Rondo de varsoviaj studentoj jam havas sekciojn ĉe tri altlernejoj de la pola ĉefurbo. La Rondo ankaŭ pasintjare organizis sukcesan seminarion, kiu okupiĝis pri la fremdlingva instruado kaj la metodiko de la instruado de la Internacia Lingvo; tiun seminarion partoprenis ĉ. 40 gestudentoj, kiuj plej ofte jam aktivas kiel instruantoj de Esperanto en studentaj medioj. Menciinde estas ankaŭ, ke el unu el pli fruaj entreprenoj de la Interlingvistika Scienca Rondo rezultis ellaboro de speciala lernolibro por instrui la Internacian Lingvon en universitataj medioj; tiu lernolibro nun estas presata. Pri la ĉi-jara seminario informas: Socjalistyczny Związek Studentów Polskich, Rada Uczelniana Uniwersytetu Warszawskiego, Komisja Nauki, Krak. Przedmieście 24, PL-00-325 Warszawa, Polando.

**LA 30A INTERNACIA
JUNULARA
KONFERENCO**
1974 08 03 – 08 10
Münster,
FR Germanujo
Adreso: 30a IJK
p/a Gisela Jungkamp,
Mondstr.3, D-44 Münster.



LAŬ LA LASTAJ INFORMOJ, cento da gejunuloj el 23 landoj jam aliĝis al la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO, kies ĉeftemo estos: "Junularo kaj Edukado". Oni akcentas, ke la nombro de aliĝintoj, kompare al la antaŭaj spertoj de TEJO, estas konsiderinde alta por tiu ĉi parto de la jaro. Tio ĉi aparte gravas por tiuj, kiuj planis tion fari, sed ankoraŭ ne aliĝis



**Ventmueliloj estas tipe, sed ne ekskluzive nederlandaj:
Subĉiela muzeo en la proksimeco de Münster.**

al la Konferenco, ĉar la organizantoj el Münster atentigas, ke la nombro de tiuj, kiuj povos loĝi en la nun finkonstruata studenta domo, estas limigita al 220 personoj. Kompreneble, ke tiu nombro neniel signifas limigon de pliaj aliĝoj, sed nur, ke tiuj, kiuj aliĝos pli poste, devos kalkuli pri la fakto, ke ili loĝos en alia, ne tiom avantaĝa studenta domo. Oni konsideru ankaŭ la fieran atentigon de la organizantoj, ke la finkonstruata konferencejo (ekskluzive unulitaj ĉambroj) vere donos eblecon ĝui unuarangan, preskaŭ hotelan, komforton, ĉar temas pri studenta domo konstruata "laŭ la sama konstrumaniero kiel la Olimpika Vilaĝo" en Munkeno.

La ĵus pasinta fino de marto signifis ankaŭ la finon de la dua favora aliĝperiodo, almenaŭ kiam temas pri la aliĝkotizoj. Ekde la 1-a de aprilo 1974 validas jenaj aliĝkotizoj por la 30a IJK:

Aĝo de la	ĝis 1974 06 30	post 1974 06 30		
partoprenonto	M	N	M	N
malpli ol 20 j.	95	105	110	120
20–25-jara	105	115	120	130
pli ol 25-jara	115	125	130	140

La kotizoj estas indikitaj en germanaj markoj kaj, kiel kutime kiam temas pri TEJO-aranĝoj, ili inkluzivas ankaŭ la loĝ- kaj manĝ-kostojn dum la konferenca semajno. La aliĝkotizojn oni sendu al poŝtĉekkonto: **Dortmund n-ro 1196 20-468**, je la nomo de **Ulrich Brandenburg, Vadrup 276, D-4401 Westbevern**. Tiuj kiuj ne povas uzi la poŝtĉekkonton, bv. uzi la bankkonton n-ro 776 396 ĉe **Kreissparkasse Münster**, indikante la saman nomon kiel ĉe la poŝtĉekkonto.

Britujo

• Dum februara kunsido de la Konsilantaro de Brita Esperantista Asocio estas decidite, ke la Esperanta nomo de la Asocio estonte tekstu "Brita Esperanto-Asocio", por tiel emfazi, ke ne temas pri "nura asocio por esperantistoj, sed la asocio por la antaŭenigo de Esperanto".

Ĉeĥoslovakujo

• Ekde 1969, en la kadro de la Federacio de Ĉeĥoslovakaj Filatelistoj funkcias aparta Esperanto-sekcio, kiu eldonas dulingvan informilon. Pere de partopreno en landaj kaj internaciaj filatelistaj ekspozicioj, la membroj de la sekcio sukcese atentigas pri la Internacia Lingvo. S-ro Dolfa Bartošík, UEA-delegito en Prago, posedas kolekton de Esperantaj poŝtmarkoj, kiu ĝis nun gajnis 6 orajn kaj 7 arĝentajn medalojn en naciaj kaj internaciaj ekspozicioj. La kolekto de s-ro Vláška Hasala gajnis ĝis nun 7 arĝentajn kaj 4 bronzajn medalojn.

Francujo

• En la departemento Pyrénées-Orientales okazas tuta serio da prelegoj kaj provlecionoj pri la Internacia Lingvo en liceoj kaj kolegioj. Prelegas la delegito de UEA en Perpignan, s-ro René Llech-Walter, laŭ aparta permeso de la regiona lerneja inspektoro. La prelegojn, kiuj okazas en la kadro de la oficiala horaro por kulturaj aktivecoj, regule ĉeestas granda nombro da gelernantoj kaj geinstruistoj. La foto (de J. Roig) pruvas la interesecon de gelernantoj en liceo apud Perpignan.



• Ekde 1961, en la pariza kafejo "Ma Bourgogne" (10 Place des Vosges, Paris 4^e), en la fama kvartalo apud la Bastille, ĉiusemajne okazas neformalaj renkontiĝoj de esperantistoj, kiujn dum la lasta jardeko vizitis pluraj centoj da gastoj. La kunvenoj ne plu okazas lunde, sed ĵaŭde, kun komenciĝo je la 19.45h.

Jugoslavio

• *Homo kaj Kosmo*, la bela kaj la sola popularscienca periodaĵo en la Internacia Lingvo (v. *Esperanto*, dec. 1973, p. 213), eldonata de la Kroata Naturscienca Societo, Zagreb, daŭrigos ankaŭ ĉi-jare sian aperadon. Pro nesufiĉa abon-subteno, la kvaronjara revuo spertis fine de 1973 finanĉan krizon, kiu feliĉe iel solviĝis. La abono, kiun peras ankaŭ UEA, altiĝis al 6 gld. jare, kio efektive estas elspezinda sumo por kvar 30-paĝaj numeroj de valora kaj interesa enhavo.

• Du semajnaj revuoj en Zagreb, *Modra lasta* (150 000 ekz.) kaj *Tina* komencis aperigadi kurson de la Internacia Lingvo (mĝ).

Usono

• D-ro E.J. Lieberman, prezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, sendis oficialan inviton al Ĉina Esperanto-Ligo, pere de ĝia prezidanto Hujucz, reprezenti en la 22a ELNA-Kongreso en Spokane inter la 21a kaj la 23a de junio 1974. Tiu ĉi invito rezultis el debatoj dum la pasintjara kongreso de ELNA, kiu samtiel favore esprimiĝis pri klopodoj, kies celo estus vizito de delegacio de ELNA al Ĉinujo.

Pollando

• Pola Nacia Muzeo en Gdańsk ĵus eldonis 6-paĝan informilon en la Internacia Lingvo pri siaj ekspozicioj kaj historio. La informilon oni povas ricevi de Pola Esperanto-Asocio, p.k. 222, Gdańsk 6, kontraŭ 1 internacia respondkupono.

Kanado

• Post prelego al 150 gelernantoj en Mississauga, Ontario, 75 el ili volis lerni la Internacian Lingvon, sed s-ino Vilma Eichholz povis akcepti la instruadon nur al 30 gelernantoj, elektitaj el la 4a, 5a kaj 6a klasoj. Post 20 lecionoj, okazantaj dum la lunĉo-paŭzo, la rezultoj estis tiel bonaj, ke ili logis raportiston de *The Globe and Mail*, unu el la plej prestiĝaj kanadaj ĵurnaloj (270 000 ekz.), kiu en longa artikolo tre favore raportis pri la kurso.

Sovet-Unio

• Oni sufiĉe ofte aŭdas plendojn ke eĉ landaj kaj internaciaj organizaĵoj agas, se ili agas, sen aparte elaborita plano de siaj aktivecoj. Tio ĉi neniel povus rilati al Riga Esperanto-Klubo en la ĉefurbo de Latvujo. Nian redakcion atingis bele presita programo de kunvenoj por la tuta laborsezono de la komenco de septembro 1973 ĝis la fino de majo 1974. La programo montras, ke la Klubo, kiu aktivas en la kadro de Latva Respublika Domo pri Kulturo, realigas mirinde viglan agadon kaj, ke ĝiaj programoj ne ĉiam restas en la fermita kadro de la Movado, sed aŭdacas diskuti problemojn de la internacia komunikado ankaŭ kun la neesperantista junularo de Riga.

Bulgarujo

• El Vraca (kie en 1963 okazis TEJO-kongreso) oni raportas pri interese eksperimento de la instruisto E. Daskalov, kiu sukcese instruas la Internacian Lingvon al trideko da 6-jaraj infanoj de la antaŭlerneja instituto "Slavejkov".

Italujo

• Semajno de Internacia Amikeco instigis al pluraj sukcesaj aranĝoj je la loka nivelo. En Trento, la urbo kiu pasintjare gastigis la Italian Kongreson de Esperanto, al la solenaĵo de SIA venis ankaŭ s-ro R. Ballardini, deputito de la Itala kaj Eŭropa parlamentoj, kiu interalie favore parolis ankaŭ pri la itala leĝpropono pri la instruado de Esperanto.



Universitatoj

• En la kadro de la Lingvistika Rondo de la Luiziana Ŝtata Universitato en Baton Rouge, okazas vespera kurso de la Internacia Lingvo, kiun ĉefe partoprenas magistriĝaj kaj doktoriĝaj kandidatoj en teoria lingvistiko. Sur la supra foto estas la kursgvidanto d-ro R.E. Wood (maldekstre) kaj kursanoj el Usono, Kanado, Nederlando kaj Hindujo.

Ekumenismo


• Stab-membroj de la Monda Konsilantaro de Eklezioj en Ĝenevo ne oficos dum septembro ĉi-jare pro speciala kurso de la germana lingvo. La partoprenantoj de ĉi tiu kurso jam devas bone regi la germanan, kaj dum kvar semajnoj en septembro ili estos instruitaj pri la germanlingva ekumenisma kaj teologia terminaroj – 35 horojn ĉiusemajne.

Speleologio

• En la ĉiujare eldonata *Arkivo por sveda grot-esplorado*, apud la sveda teksto, regule aperas resumoj en la angla, Esperanto, franca kaj germana. La konata popularscienca aŭtoro Leander Tell (*La bela subtera mondo*), kiu dum dek jaroj redaktis la *Arkivon*, antaŭ nelonge estis distingita per Ora medalo kaj diplomo de la Universitato en Olomouc (Ĉeĥoslovakujo), dum la tie okazinta Internacia speleologia kongreso.

Eldonejoj

• Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, Danlando, publikigis antaŭ nelonge katalogon pri siaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo. Temas pri 12-paĝa broŝuro, riĉe ilustrita, enhavanta pli ol 50 librotitolojn, kiujn sekvas mallongaj trafikaj prezentoj



Boulton

• Mag. Marjorie Boulton, jam bone konata verkistino ne nur en la Internacia Lingvo sed ankaŭ en la angla, pasigis fine de la pasinta jaro plurajn monatojn en Usono, lige al siaj doktoriĝaj literaturaj studoj en pluraj usonaj bibliotekoj. Tie ŝi plurfoje prelegis en la Internacia Lingvo, kiu ludis apartan rolon en ŝiaj studoj kaj pri kio ŝi promesis iam poste raporti pli detale.

van Dalsem

• Ramona van Dalsem, la plej populara kantaŭtoro en la Internacia Lingvo, aperis kun orkestro en nederlanda radio-programo. En la populara elsendo "Van twaalf tot twee" (De la 12a ĝis la 2a), s-ino van Dalsem kantis en Esperanto "Pacon volas ni" kaj iom parolis pri la Semajno de Internacia Amikeco.

de ĉiu unuopa libro. Ankaŭ la hungara eldonejo Kultura publikigis faldfoliojn pri la plej novaj hungaraj libroj kaj revuoj eldonitaj aŭ eldonataj en la Internacia Lingvo.

Scienca Literaturo

• La scienca literaturo en la Internacia Lingvo ĵus riĉiĝis per plia volumo. Temas pri 88-paĝa verko de prof. Enrique Balech, kiu laŭ ĉi tiu libro lekcios en la biologia fakto de la ĉi-jara sesio de Someraj Universitataj Kursoj (de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974) en Lieĝo (Belgujo). *Planktono kaj mara produktado* estas la titolo de ĉi tiu verko, nepre aktuala en la nuna tempo en kiu oni ĉiam pli ofte turniĝas al la maro kiel eventuala solvo de pluraj problemoj, kiuj turmentas la homaron.

Anarkismo

• Prof. J.E. Bachrich, la peranto de UEA en Venezuelo, sendis al ni la februaran numeron de la anarkista revuo *RUTA*, kiu aperas en tiu lando. La tuta numero 17 de *RUTA* (entute 32 paĝoj) estas dediĉita al la Internacia Lingvo. Kompreneble, pluraj artikoloj en la revuo traktas la ĝisnunajn ligojn de la anarkista movado kaj Esperanto, sed la materialo ĝenerale estas pli ol favora al la Internacia Lingvo.

Kaŭakami

• F-ino Tamiko Kaŭakami akiris komence de februaro la titolon de sinjorino, – ŝi edziniĝis al la norvega bibliotekisto s-ro Asbjern Nielsen. Kaj, kvankam nia revuo ne plu sekvas tiajn ĉi okazaĵojn, nek plu estas novaĵo edziniĝo de japaninoj al eŭropanoj, ni trovis la novaĵon pri Tamiko preskaŭ "mondskua", des pli, ke



ĝi signifas la finon de ŝiaj enormkvantaj vojaĝoj, tiom utilaj por la Movado. Cignokante – eĉ la geedziĝa ceremonio okazis en la Internacia Lingvo, malgraŭ tio, ke ankaŭ ŝi bone regas la norvegan.

N-ro 477, 1974 - 03 - 20

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZ: Nydia Aydos Krieger. BRIT: F.W.White. FRG: A.Borkhardt, Berthold Fischer, J.Moser, J.Schenkel, F. Schottenhammer. SVIS: M. Rich-Häni. USONO: Lanna Cheng, Armin F.Doneis Jr., Jan Long, S-ino W.B. Schwartz, Donna Slusher, P. Stein, R.A. Swenson, A. Whitteker.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1974

AŬSTRUJO: H. Zeller. BEL: André Degryse, Eskil Svane. BRAZ: Helio Fontoura Aderne, L.C. Goldenzweig. FINN: Niilo Kavenius, Lauri Vuolo. FRA: Marie-Thérèse Boiton. FRG: Felix Epstein, Martin Gründler, G. Härlein, Margarete Schumacher, W. von Waldowski, H. Wehrheim, W. Wingen, H.P. Wuenschel. HISP: A. Enriquez de Salamanca. NED: A. Breddels, A.B.M. Coppens-Brink, A. Kriek, H. Veenstra. NORV: E. Maarli, Olaf Maeland. SVED: K. Gustafsson, E. Johansson, Stig Kinnander. Gösta Persson, O.Persson, Ges-roj Snarberg. SVIS: Berger-Kreth. USONO: D.W.Ellis, Simon Mudry, Paul E.Nace, W.P.Simpson.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la

dato 1974-06-15 neniuj membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

ARGENTINO: Jorge Wuest, FD Salta. AŬSTRUJO: Martin Stuppig, D kaj FD Arnoldstein. BRAZ: A. Sartorato, FD Rio de Janeiro; P.S. Viana, FD Rio de Janeiro. FRG: Kurt Fischer, D kaj FD Miltenberg; Margot Kranz, D kaj FD Oberkirch. HISP: A.A. González Meana, D La Felguera; Manuel Manteca, D Santa Cruz de Tenerife. ISR: J. Tillemann, VD Haifa; Josef Šemer, FD Tel-Aviv. JUG: T. Gregurek, FD Koprivnica; V. Dimitrijević, FD Split. SVED: O. Eklund, FD, Bernt Johansson, VD, Gösta Persson, D, ĉiuj en Helsingborg; K. Rohdin, D Kvännum; Eric Fredin, FD Lomma. SVIS: Vojislav Pytloun, D Winterthur. USONO: W. B. Schwartz, FD San Diego; E. O'Brien Stafford, FD Seattle.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri jenaj delegitoj en Jarlibro 1973, Unua Parto.

BELG: Charleroi, D. FRG: Beckum, D. Hamburg, FD (juro). HISP: Cullera, D kaj FD. JUG: Novi Sad, FD (virinaj aferoj). POLL: Toruń, FD. PORT: Lisboa, FD (maristaj aferoj). SVIS: Winterthur, D kaj FD (komerco).

DONACIOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Engelsher 1053,77. Sumo ĝisnuna 1053,77.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgujo: G. Pirlot 3,93. Sumo ĝisnuna 3,93.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: I. Helsingius 41,47. Islando: K. Sigurdsson 10,—. Memore al Hertha Wilke 60,—. Svedujo: E. Carlén, okaze de Semajno de Internacia Amikeco, 50,—; S. Möllestad 12,20. Sumo ĝisnuna 173,57.

ĜENERALA KASO: Anon. 12,50. Aŭstralio: A.G. Browne 17,14. FRG: E. Kruse 22,73; A. Mosch 12,35; R. Schinkel 10,44; K. Schönrich 100,—. Hispanujo: López Escartin 8,20. Monako: Esperanto-grupo de Monako 6,40. Nederlando: P.A. Buijsters 2,32; S.v. Wijngaarden 10,—. Svedujo: P. Almén 23,61; E. Carlén 50,—. Usono: Elizabeth O'Brien Stafford 7,70. Sumo ĝisnuna 283,39.

PATRONAJ MEMBROJ A DE TEJO 1974: 12. H.M. Schippers, Ned. 13. H. Laine, Finnlando. 14. F. Swift, Nov-Zelando. 15. R. Triolle, Francujo. 16. J. Azcuénaga, Hispanujo.

PATRONAJ MEMBROJ B DE TEJO 1974: 1. S.Järvinen, Finnlando. 2. Carlo Minnaja, Italujo.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: L.E.E.N. 556,—. Sumo ĝisnuna 556,—.

FONDAĴO TEJO: Finnlando: A. Linja 9,43. Nederlando: A.M.Slot-v.d. Meulen 75,—. Sumo ĝisnuna 84,43.

Al ĉiuj koran dankon!

U E A

Nekrologoj

PAUL BOUVIER (1889-1974)

La 4an de februaro en Ĝenevo forpasis Paul Bouvier, lerninta la Internacian Lingvon kun siaj gimnaziaj kolegoj Privat kaj Hodler, kun kiuj li kamaradis ankaŭ per sia nobleco. Li estis delegito kaj dumviva membro de UEA, gvidis kursojn (ankaŭ radio-kurson en 1948); ampleksan arkivon li donacis al la Centro pri dokumentado kaj studoj pri la lingvo internacia en La Chaux-de-Fonds.

FRED PARKER (1886-1974)

Fervora multjara aktivulo je la loka (Lancashire, Anglujo), nacia kaj in-

ternacia niveloj de la Movado, Fred Parker, forpasis la 19an de marto. Interalie, li en la Movado plenumis la funkciojn de la vicprezidanto de Brita Esperantista Asocio kaj de la komitatano de UEA. En sia loĝloko Burnley, li funkciis dum jardekoj kiel delegito kaj fakdelegito de UEA.


SIPKE STUIT (1908-1974)

En Arras, la norda Francujo, la 26an de februaro forpasis Sipke Stuit, frisedvena nederlandano, kiu tie loĝis depost 1934, kiam li edzinigis francan esperantistinon. Lerninte la Internacian Lingvon en sia junaĝo, li multe vojaĝis, prelegis, gvidis kur-

sojn, verkis artikolojn kaj poemojn. Al liaj iniciatoj oni dankas ankaŭ la aperon de du tradukoj el la frisa lingvo: *Dorse al la muro* kaj *Frisaj rakontoj en Esperanto*.

H. WITKOWSKI (1921-1974)

En la aĝo de 53 jaroj, la 5an de marto forpasis en Toruń, Pollando, Henryk Witkowski, kiu dum 30 jaroj aktivis en la Movado kaj interalie prezidis la lokan filion de PEA. Post la Dua Mondmilito, li helpis en sia urbo revivigi la Movadon, gvidis kursojn, estis fakdelegito de UEA, lekcis pri la Internacia Lingvo en la Universitato de Toruń.



Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Varsovio

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 13.38 m (21705 kHz). I.P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrujo. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

08.30-08.55 Sofio, 49.42 m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

10.30-11.00 Muritiba, 190 m (1580 kHz). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

11.00-11.30 Pekino, 47 m, 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

12.30-13.00 Pekino, 30 m, 25 m. I. 20.00-20.20 Romo, 50.08 m (5990 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofio, 50.61 m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kHz) kaj Guarulhos, 205 m (1460 kHz), 90.23 m (3325 kHz). I.K. Sintezo de Esperanto, Caixa Postal 370, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.

12.20-12.30 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 16.86 m (17795 kHz), 13.94 m (21520 kHz), 13.90 m (21585 kHz). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongiĝoj: I = informoj; P = parolado; K = kurso.

12.30-12.45 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto de la sabata programo el Varsovio unu fojon en la monato.

Marde

16.45-17.00 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).

12.30-12.45 Vieno, 203 m (1475 kHz). P. (ĉiun kvaran sinsekvan merkredon).

20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

16.35-16.50 Bratislavo, kiel marde. 21.45-21.55 Berno, 75.28 m (3985 MHz), 48.66 m (6165 kHz), 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 31.28 m (9590 kHz), 31.14 m (9635 kHz), 25.60 m (11720 kHz), 25.27 m (11870 kHz). P. (d-ro Baur).

Vendrede

18.00-18.30 Clermont-Ferrand, (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 43 m, 33 m, 31 m. I.

23.05-23.20 Zagrebo, 264 m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Sabate

00.05-00.20 Varsovio, 1321 m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo kaj povas esti prokrastita ĝis 00.30.

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe. 16.45-16.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17780 kHz). I.P. 20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede. 21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

22.00-22.15 Valencio, 358 m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

RADIO VARSOVIO krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por esperantistoj"; 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

USONO. Radio-kurso estas dissendata de diversaj lokaj stacioj (vidu la oktobran rubrikon).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loka aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203 m, 48.74, 41.38 m), Zagrebo;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba-Guarulhos (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (16.87 m, 13.38 m) en sudorienta Azio;

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Berno (31.28 m, 31.14 m, 25.60 m, 25.27 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m, 13.90 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigbla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Kanado. Kiu ŝatus fari interesajn vortarajn laborojn (ĉefe tajpadon) por duona jaro kaj vivi kiel gasto en nia familio? Ni pagos flugkostojn, sed ne salajron. Laboremul(in)o sendu detalan respondon al Eichholz, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ontario.

Guy Coste, Norra Järnvägs gat. 23, S-931 00 Skellefteå, Svedujo, 28-jara franca teknikisto, nun instruanta la francan kaj la anglan lingvojn al geplenkreskuloj kaj gejunuloj en Norda Svedujo, serĉas laboron ekster Svedujo kaj Francujo ekde majo 1974.

Corneliu Alex Tausciuc (Bubu) kun familio translokiĝis el Rumanujo al jena adreso: 36-06 31st Avenue, Apt. 1A, Long Island City, N.Y. 11106, Usono.

Familio Tausciuc elkore dankas pro la helpo ricevita dum translokiĝo al jenaj ges-anoj: Denise Badet, Francujo; Rudolf Matzke, Aŭstrujo; prof. Elio Migliorini, Italujo; Ĝiĝi Harabaĝiu kaj Sergio Docal, Usono; Florin Caragea, Germanujo.

Edziĝcele dez. korespondi (Esperanto, angla, germana) 35-jara flugkompania oficisto Mehmet Telyakar, Aydınlık sok no.23, Ortaköy, Istanbul, Turkujo.

Lernantino, Linda de Schepper, Dornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgujo, deziras korespondi kun fraŭlinoj 14-16-jaraj el Nederlando aŭ aliaj proksimaj landoj. Respondo certa.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi ideojn kun parapsikologoj kaj aliaj interesuloj pri interstelaj kontaktoj bioradiaj kaj pri aliaj fenomenoj malfacile kompreneblaj. Ingvar Agnarsson, Hábraut 4, Kópavogi, um Reykjavík, Islando.

Oficialaj vortoj. Presita listo denove aĉetebla kontraŭ 3 int.rkp. de Edward Ockey, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey, SM7 3PU, Anglujo. Ĉiuj vortoj el Universala Vortaro kaj Oficialaj Aldonoj alfabeto ordigitaj en 24-paĝa kajero kun ĉiuj anglalingvaj tradukoj rekomenditaj de la Akademio. Esenca konsultilo por vera esperantisto.

Fratino Philip-pa Margaret S.C. 48, anglikana monaĥino, deziras korespondi kun gemonahoj el la tuta mondo. 4964 Newton Drive, Las Vegas, Nevada 89121, Usono.



Kio estas tutmondismo? Estas la agado de la mondcivitanoj, kiuj volas forigi de la mondo: internaciajn militojn, malsaton, socian maljuston, subpremon. Por atingi tiujn celojn, ili proponas krei supernaciajn aŭtoritatojn, kapablaj solvi mondajn problemojn. Skribu al: Volpeliere, 10, rue Servie, F-30000 Nîmes, Francujo.

Volas aĉeti aŭ interŝanĝi produktaĵojn, komercaĵojn, k.a. en la mondo. Bonvolu sendi katalogojn aŭ leteron. Hasegawa Yoshihumi, P.O.Box 61, Wakayama, 640, Japanujo.

Ĉu vi jam posedas la sukcesan novan legolibron AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO? Se ne, mendu ĝin tuj ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉekkonto: 37 89 64. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendokostoj 10%.

Pagantaj gastoj estas akceptataj en idilia vilaĝeto apud maro kaj arbaro. Infanoj bonvenaj. Petu informojn ĉe: Tove Madsen, Sølbyvej 40, DK-8354 Hov. Danlando.

Anoj de siberia E-klubo "Oazo" deziras korespondi tutmonde. Esperanto-klubo, p.k.II, Barnaul-99, Sovet-Unio.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan beletraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankantan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.



Por entuziasmigi junaj komencantojn, bonvolu amase sendi poŝtkartojn por "Poŝtkartvespero" fine de aprilo. Respondo garantiita. Juna Rondo, Box 271, S-543 01 Tibro, Svedujo. (v. la supran foton).

Deziras tutmondan korespondadon, poŝtkartojn, interŝanĝon, vivmanieron, ĝeneralajn: Henry El., 29-11 40th Road, L.I.C., N.Y. 11101, Usono.

Nederlandano, 47-jara fraŭlo, volas gastigi junulon ĝis 24 jaroj dum unu aŭ du semajnoj. R. van Es, Het Breed 931, Amsterdam-N, Nederlando.

Dek mil libroj disponeblaj!

Dank' al la instalo de moderna kserografia kopiilo en la Domo de UEA en Rotterdam, la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler, kun multaj miloj da libroj kaj gazetkolektoj, estas nun atingebla je moderaĵaj prezoj por ĉiuj membroj ĉie ajn en la mondo. Jen nur kelkaj ekzemploj de jam pretaj kaj tuj livereblaj fotokopioj. La Fotokopia Servo de UEA volonte plenumas viajn mendojn pri tiuj aŭ iu ajn alia volumo el sia kolekto. Petu oferton pri specifa verko aŭ petu kompletan liston de la jam pretaj kopioj!

<i>Kiel plaĉas al vi</i> (Shakespeare) 137p. Ilustr.	21,70
<i>Statistiko de 50 000 tekstvortoj</i> (Blaas) 1950	12,50
<i>La langue internationale</i> (Zamenhof) 1887	9,20
<i>Bhagavad-Gîtâ</i> (tr. Lorenz) 1942 95p.	16,40
<i>Filozofia vortaro</i> (Kamaryt) 1934. 170p.	14,75
<i>Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esp.</i> 86p.	8,60
<i>Oduseias de Homeros</i> (tr. Manders) 306p.	48,20
<i>La ringo de la generalo</i> (Lagerlöf) 127p. 1938	11,60
<i>La venecia komercisto</i> (Shakespeare) 101p.	10,10
<i>Dekdu poetoj</i> (red. Kalocsay) 126p. 1934	11,60
<i>Infero</i> (Dante/Kalocsay) Ilus. ĉ.300p. 1933	49,40
<i>Plena gramatiko vol. 2</i> Eldono 1964. 178p.	29,60
<i>Sinjoro Tadeo</i> (Mickiewicz/Grabowski) 334p.	30,—
<i>Robinsono Kruso</i> (Defoe) 143p. 1908.	12,80

Ĉiu kompleta kopio estas liverata en plaĉa plasta bindaĵo. Prezoj estas en guldenoj. Aldoniĝas 10% por sendokostoj kaj, por Nederlando, 4% imposto.

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

HELPU REKLAMI



LA 59-AN

Universalan Kongreson en Hamburgo, uzante sur viaj korespondaĵoj la allogan dukoloran glumarkon!

Folio po 10 markoj kostas 0,55 gld, afrankite (por Nederlando: 0,60 gld afr).

Mendu ĉe UEA

REVOLUCIA REVENO AL LA FONTO DE ESPERANTO

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto", de L. Mimó.
Prezo 17,50 guldenoj.

OFERTO!

KVIN CENT (500!)

malsamaj poŝtmarkoj de Usono.

Ĉiuj estas grandformataj memorigaj


bildmarkoj. Prezo: 80 gld. Ĉi tiu stoko estas limigita.

Pliaj ofertoj: - 400 malsamaj: 60 gld. 300 malsamaj:

40 gld. 200 malsamaj: 25 gld. Ĉiuj en bona stato.

La prezoj inkluzivas la sendokostojn kaj imposton

nederlandan. Mendu ĉe UEA. Rapidu! Ne maltrafu ĉi tiun specialan oferton!



Copernicus
1473 - 1973



8c US




U.S. POSTAL SERVICE 8c

Lyndon B. Johnson

United States
8 cents






Jen la solvo de la problemo

kiel teni en bona ordo viajn ekzemplerojn de "Esperanto". Tiu ĉi bela, mane farita bindilo permesas al vi aldoni en nuraj sekundoj ĉiun novan numeron de la revuo tuj post ĝia apero. Jam de la unuaj numeroj vi do havas pretan kolekton. Simpla sed efika sistemo certigas, ke la paĝoj kuŝas ebenaj por facila legado ĝis la meza rando. Prezo: 7,20 (por Nederlando 8,35) gld. plus sendokostoj 10%.

Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

internacia lingvo



NUN ANKAŬ EN LA FORMATO A3!
La konata internacia afiŝo de UEA, kvarkolora desegnaĵo de Tadeusz Moskala, aperis nun ankaŭ en la oportuna norma formato A3 (420x297 mm), kaj kostas nur 0,25 gld. (por nederlando 0,29), plus sendokostoj 10%. Minimuma mendo: 10 ekzempleroj. Libroservo de UEA.

universala esperanto-asocio nieuwe binnenweg 176 rotterdam-3002 nederlando



Vi trovos pli bonan kvaliton ĉe ni

U.E.A. nun disponas pri kvanto da gramofondiskoj de klasika muziko. La prezoj estas tre favoraj: 8,10 aŭ 9,— gld. (por Nederlando 9,40 aŭ 10,45 gld.) plus sendokostoj 10% kaj la diskoj estas bonkvalitaj. La tekstoj sur la kovriloj estas en diversaj naciaj lingvoj (NE en Esperanto!).

Inter la diskoj, kiujn ni jam havas, troviĝas verkoj de Bach, Beethoven, Dvořák, Haydn, Mozart, Schubert kaj Schumann; inter la artistoj estas Ančerl, Arrau, Haitink, Munclinger, Navarra kaj Ojstraĥ. Ĉiun titolon kontrolas, laŭ teĥnika kaj artisma vidpunktoj, gramofona fakulo, antaŭ ol ni aperigas ĝin en la katalogo. Depende de la reago, la elekto-eblecoj povus fariĝi ankoraŭ pli vastaj: jam nun ni volonte serĉus kontraŭ mendo aliajn diskojn el Ĉeĥoslovakujo, Germana Dem. Resp. aŭ Polujo.

Detalan liston de la diskoj jam haveblaj oni povas ricevi kontraŭ respondkupono ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.